


DEK NOVELOJ DE MAUPASSANT

Esperantigis Noël Lecomte
Ilustraĵoj de Tatjana Ĥomakova

LA PLUVOMBRELO



Al Camille Oudinot [Kamilo Udino]

Sinjorino Orelo estis ŝparema. Ŝi konis la valoron de unu soldo, kaj posedis armilaron da severaj principoj koncerne la akumuladon de mono. Evidente, ŝia domservistino penegis por plenigi la bazarkorbon; kaj S-ro Orelo obtenis sian poŝmonon nur kun ekstrema malfacileco. Tamen ili komferte vivis, kaj ne havis infanojn; sed S-ino Orelo sentis veran doloron, kiam ŝi vidis eliri la monerojn de sia hejmo. Tio estis kiel korŝiro; kaj ĉiufoje kiam ŝi devis elspezi kelkan monsumon, kvankam nepre necesan, ŝi tre malbone dormis la sekvantan nokton.

Orelo senĉese ripetis al sia edzino:

– Vi devus esti pli donacema, ĉar neniam ni elspezas niajn rentojn.

Ŝi respondis:

– Neniam oni scias tion, kio povas okazi. Preferinde estas posedi pli multe ol malpli.

Ŝi estis malgranda kvardekjara virino, vigla, sulkiĝanta, pura kaj ŝi estis ofte incitita.

Ŝia edzo ĉiumomente plendis pro la seniĝoj, kiujn ŝi suferigis al li. Iuj el tiuj seniĝoj estis aparte tedaj al li, ĉar ili atingis lian memŝatemon.

Li estis ĉefa komizo en la milita Ministerio, kaj li restadis tie nur por obei al sia edzino, por pligrandigi la neutiligitan enspezon de la hejmo.

Nu, dum du jaroj, li venis al la oficejo, kun la sama flikita pluvombrelo, kiu ridigis liajn kolegojn. Tedita pro iliaj mokaĵoj li postulis, ke S-ino Orelo aĉetu al li novan pluvombrelon. Ŝi aĉetis al li unu, kiu kostis ok frankojn kaj kvindek centimojn, temis pri rabata artiklo de granda magazeno. La oficistoj ekvidante tiun objekton, kiu multnombre svarmis en Parizo, rekomencis iliajn ŝercojn, kaj Orelo abomeninde suferis pro tio. La pluvombrelo senvaloris. Post tri monatoj ĝi estis neuzebla, kaj tio gajigis la tutan Ministerion. Oni komponis eĉ kanzonon pri tio, kiun oni aŭdis dum la tuta tago, de la supro ĝis la malsupro de la vastega konstruaĵo.

Orelo, incitegita, ordonis al sia edzino, ke ŝi elektu novan pluvombrelon, el fajna silko, je dudek frankoj, kaj ŝi alportu al li la pruvan fakturon.

Ŝi aĉetis unu je dek ok frankoj, kaj transdonante ĝin al sia edzo, ruĝa pro la inciteco, ŝi deklaris:

– Vi havos ĝin por almenaŭ kvin jarojn.

Orelo, triumfanta, atingis veran sukceson en la oficejo.

Kiam vespere li revenis hejmen, lia edzino ekrigardante per maltrankvila okulo la pluvombrelon, diris al li:

– Vi ne devus lasi ĝin kunpremita per la kaŭĉuka ringo, tio estas la plej bona rimedo por tranĉi la silkon. Vi devas atenti pri ĝi, ĉar mi ne aĉetos baldaŭ alian al vi.

Ŝi ekprenis ĝin, malagrafis la ringon kaj skuis la faldojn. Sed ŝi restadis frapata pro la emocio: ronda truo, granda kiel centimo, aperis meze de la pluvombrelo. Estis cigara bruldifekto!

Ŝi balbutis:

– Kion ĝi havas?

Ŝia edzo trankvile respondis, ne rigardante:

– Kiu, kio? Kion vi volas diri?

Nun la kolero sufokis ŝin, ŝi ne plu povis paroli:

– Vi... vi... bruligis... vian... vian... pluvombrelon. Sed vi... vi... vi do frenezas!...

Vi volas malriĉigi nin!

Li sin turnis, sentante sin paliĝi:

– Kion vi diras?

– Mi diras, ke vi bruligis vian pluvombrelon. Jen!...

Kaj impetante al li, kvazaŭ ŝi volis frapi lin, ŝi violente metis la etan cirklan bruldifekton sub lian nazon.

Li restadis konfuzegita antaŭ tiu bruldifekto, balbutante:

– Tio, tio... kio estas tio? Mi ne scias! Nenion mi faris, nenion, tion mi ĵuras al vi. Mi ne scias, kiu difektis mian pluvombrelon!

Nun ŝi kriis:

– Mi vetas, ke vi ŝercis per ĝi en via oficejo, ke vi ludis la ĵongliston, ke vi malfermis ĝin por montri ĝin.

Li respondis :

– Mi malfermis ĝin nur unufoje, por montri kiom ĝi estis bela. Jen la tuto. Tion mi ĵuras al vi.

Sed ŝi furioze piedfrapis, kaj ŝi faris al li geedzan scenon, unu el tiuj, kiuj igas la familian hejmon ankoraŭ pli timinda por pacema viro ol batalkampon, kie pluvus la kugloj.

Ŝi alĝustigis flikaĵon el silkopeco, tranĉita sur la malnova pluvombrelo, kiu estis malsimila koloro; kaj la postan tagon Orelo foriris kun la mieno humila, kun la flikita instrumento. Li demetis ĝin en sian ŝrankon, kaj pensis nur pri ĝi, kiel oni pensas pri iu aĉa memoraĵo.

Sed vespere, dum li estis apenaŭ reveninta, lia edzino ekkaptis lian pluvombrelon el liaj manoj, malfermis ĝin por kontroli ĝian staton, kaj ŝi restadis sufokiĝinta antaŭ neriparebla katastrofo. Ĝi estis kovrita per etaj truoj, kiuj evidente devenis de bruldifektoj, kvazaŭ iu malplenigis la cindron de brulanta pipo al tiu pluvombrelo. Ĝi estis komplete difektita, difektita sen espero de rimedo.

Ŝi rigardadis tion, neniun vorton dirante, tro indignigata por eligi sonon el ŝia gorĝo. Li ankaŭ, konstatante la damaĝon, restadis stulta, timegata, konsternata.

Poste ili rigardis unu la alian; poste li mallevis la okulojn; poste li ricevis sur la vizaĝon la truitan objekton, kiun ŝi ĵetis al li; poste ŝi kriis, retrovante sian voĉon en furioza impeto:

– Ha! kanajlo! kanajlo! Vi intence faris tion! Sed tion vi repagos al mi! Pluvombrelon vi ne plu havos...

Kaj la geedza sceno rekomenciĝis. Post unu horo de tempesto, fine li povis pravigi sin. Li ĵuris, ke li nenion komprenis, ke tio povis nur deveni de malbonvoleca aŭ venĝema ago.

Tintado de la pordsonorilo savis lin. Estis amiko, kiu venis por vespermanĝi.

S-ino Orelo submetis la kazon al li. Koncerne aĉetadon de nova pluvombrelo, tio estis finita, ŝia edzo ne plu havos tion.

La amiko prudente argumentis:

– Tiam, sinjorino, li difektos siajn vestaĵojn, kiuj evidente pli multe valoras.

La malgranda virino, ankoraŭ pli furioza, respondis:

– Tiam li prenos senvaloran pluvombrelon. Mi ne donos plu al li novan el silko.

Je tiu penso, Orelo ribelis.

– Tiam mi demisios! Sed mi ne iros al la Ministerio kun senvalora pluvombrelo.

La amiko reparolis:

– Mendu rekovri ĝin per nova silko, tio ne multekostas.

S-ino Orelo, furiozigata, balbutis:

– Necesas almenaŭ ok frankojn por rekovri ĝin. Ok frankojn kaj dek ok frankojn, tio faras dudek ses! Dudek ses frankojn por unu pluvombrelo, sed tio estas frenezaĵo! tio estas ekstravaganco!

La amiko, malriĉa burĝo, estis bone inspirinta:

– Pagigu tion per via asekuro. La asekuraj kompanioj pagas la brulintajn objektojn, kondiĉe ke la damaĝo okazis en via loĝejo.

Post tiu konsilo la malgranda virino tute kvietiĝis, kaj post unu minuto de pripenso ŝi diris al sia edzo:

– Morgaŭ antaŭ ke vi iru al via Ministerio, vi vizitos la oficejojn de "La Patrino", por konstati la staton de via pluvombrelo, kaj insiste peti la pagon.

S-ro Orelo eksaltis.

– Mi neniam faros tion! Estas perditaj dek ok frankojn, jen la tuto. Ni ne mortos pro tiu perdo de mono.

Kaj la postan tagon li eliris kun marŝbatono. Feliĉe estis bela vetero.

Restante sola hejme, S-ino Orelo ne povis konsoliĝi pri la perdo de siaj dek ok frankojn. La pluvombrelo estis sur la tablo de la manĝoĉambro, kaj ŝi rondiris ĉirkaŭ ĝi, ne sukcesante decidiĝi.

Ŝi senĉese pensis pri la asekuro, sed ŝi ankaŭ ne kuraĝis alfronti la mokemajn rigardojn de la sinjoroj, kiuj akceptos ŝin, ĉar ŝi estis timida antaŭ la mondumo, ruĝiĝante por nenio, embarasata tuj post kiam ŝi devis paroli al nekonatuloj.

Tamen la eventualeco perdi dek ok frankojn suferigis ŝin, kiel vundo. Ŝi ne plu volis pensi pri tio, sed la memoro pri tiu malprofito dolore martelis ŝin. Tamen kion fari? La horoj pasis, ŝi decidiĝis por nenio. Poste, subite, kiel la malkuraĝuloj kiuj fariĝas bravuloj, ŝi decidiĝis:

– Mi iros, kaj mi ja vidos!

Sed unue necesis, ke ŝi pretigu la pluvombreton, por ke la ruiniĝo estis plena, kaj la kaŭzo facile defendebla. Ŝi ekprenis alumeton sur la kameno, kaj faris inter la bartoj, grandan bruldifekton, larĝan kiel la mano; poste ŝi delikate rulis tiun, kiu restis de la silko, fiksita la restaĵon per la elasta ŝnureto, surmetis sian ŝalon kaj sian ĉapelon, kaj rapidpaŝe malsupreniris la straton de Rivoli, en kiu troviĝis la asekura kompanio.

Sed samtempe kiam ŝi alproksimiĝis, ŝi malrapidigis sian irmanieron. Kion ŝi tuj diros? Kion oni tuj respondos al ŝi?

Ŝi rigardis la domnumerojn. Ŝi havis ankoraŭ dudek ok numerojn antaŭe de ŝi. Bonege! ŝi povis pripensi. Ŝi iradis malpli kaj malpli rapide. Subite ŝi ekstremis. Jen la pordosur kiu brilas oraj literoj: «La Patrino, asekura Kompanio kontraŭ la incendio.» Jam! Ŝi haltis dum momenteto, anksia, honta, poste preterpasis, poste revenis, poste denove preterpasis, kaj poste ankoraŭ revenis.

Fine ŝi diris al si:

– Tamen mi devas eniri. Pli bone estas frue ol malfrue.

Sed penetrante en la domon ŝi ekrimarkis, ke ŝia koro pulsatis.

Ŝi eniris en vastegan ĉambron, kiu havis ĝicetojn sur ĝia tuta periferio, kaj ĉe ĉiu ĝiceto, oni ekvidis virkapon, kies korpo estis maskita per dratreto.

Sinjoro aperis, kunportante paperojn. Ŝi haltis, kaj per timida voĉeto:

– Pardonu, sinjoro, ĉu vi povus diri al mi, kien oni devas sin direkti por ricevi monon pro brulintaj objektoj.

Li respondis per sonora voĉo:

– Unuan etaĝon, maldekstre. En la oficejo de la sinistroj.

Tiu vorto ankoraŭ plimulte timigis ŝin, ŝi emis fuĝi, nenion dirante, rezignante siajn dek ok frankojn. Sed la penso pri tiu sumo rekuraĝigis ŝin, kaj ŝi supreniris, spirmanka, haltante ĉe ĉiu ŝtupo.

En la unua etaĝo ŝi ekvidis pordon, ŝi frapis. Klara voĉo ekkriis:

– Eniru!

Ŝi eniris, kaj ŝi troviĝis en granda ĉambro, en kiu tri sinjoroj, starantaj, ordenitaj, solenaj, interbabilis.

Unu el ili demandis al ŝi:

– Kion vi deziras, sinjorino?

Ŝi ne plu trovis siajn vortojn, ŝi ripetbalbutis:

– Mi venas... mi venas... pro... pro sinistro.

La sinjoro, ĝentila, indikis seĝon.

– Bonvolu sidiĝi, mi estos je via dispono post unu minuto.

Kaj sin turnante al la du aliaj, li daŭrigis la konversacion.

– La Kompanio, sinjoroj, konsideras, ke ĝi ŝuldas al vi ne plimulte ol kvarcent mil frankojn. Ni ne povas akcepti viajn depostulojn koncerne la cent mil frankojn, kiujn vi plie pretendas pagigi al ni. Cetere la taksado...

Unu el la du aliaj interrompis lin:

– Sufiĉas, sinjoro, la tribunaloj decidis. Nur restas al ni, ke ni foriru.

Kaj ili eliris post pluraj ceremoniaj salutoj.

Ho! Se ŝi aŭdacus foriri kun ili, ŝi farus tion; ŝi fuĝus, forlasante la tuton! Sed ĉu ŝi povus fari tion? La sinjoro revenis, kaj kliniĝante diris:

– Kiel mi povas helpi al vi, sinjorino?

Ŝi malfacile artikulaciis:
 – Mi venas pro... pro tio.
 La direktoro mallevis la okulojn kun vera miro al la objekto, kiun ŝi etendis al li.
 Ŝi provis per tremanta mano demeti la kaŭĉukan ringon. Post kelkaj klopodoj ŝi sukcesis, kaj abrupte malfermis la ĉifonan skeleton de la pluvombrelo.
 La viro per kompata tono eldiris:
 – Ĝi ŝajnas al mi ja malsana.
 Ŝi hezite deklaris:
 – Ĝi kostis al mi dudek frankojn.
 Li miris:
 – Vere! Tiom multekosta!
 – Jes, ĝi estis bonega. Mi volis konstatiĝi al vi ĝian staton.
 – Bonege! Mi vidas. Bonege! Sed mi ne komprenas pri kio, tio povas koncerni min.
 Maltrankvilo ekkaptis ŝin. Eble ke tiu kompanio ne pagas la etajn objektojn, kaj ŝi diris:
 – Sed... ĝi estas bruldifektita...
 La viro ne neis:
 – Tion mi ja vidas.
 Ŝi restadis kun malfermita buŝo, ne plu sciante kion diri, kaj subite ekkonsciante pri sia forgeso ŝi rapidege prononcis:
 – Mi estas S-ino Orelo. Ni estas asekurataj ĉe "La Patrino", kaj mi venas por postuli de vi la prezon de tiu damaĝo.
 Ŝi hastis aldoni, pro la timo de firma malkonsento:
 – Mi nur petas, ke vi renovigu ĝin.
 La direktoro, embarasata, deklaris:
 – Sed... sinjorino... ni ne estas ombrelvendistoj. Ni ne povas zorgi pri tiaj flikadoj.
 La malgranda virino sentis revenon de sia memfido. Devas lukti. Do ŝi luktos! Ŝi ne plu timis, ŝi diris:
 – Mi nur petas, ke vi pagu al mi la prezon de la flikado. Mi mem mendos ĝian flikadon.
 La sinjoro ŝajnis konfuza.
 – Vere, sinjorino, por tia ripareto. Neniam oni postulas monkompenson de ni por akcidentoj, kies graveco estas tiel malgranda. Ni ne povas repagi, konsentu pri tio, la poŝtukojn, la gantojn, la balailojn, la pantoflojn, ĉiujn etajn objektojn, kiuj riskas ĉiutage suferi averiojn per flamo.
 Ŝi fariĝis ruĝa, sentante la koleron, kiu invadis ŝin:
 – Sed, sinjoro, en decembro de pasinta jaro, ni suferis kamenfajron, kiu provokis almenaŭ kvincent frankojn da damaĝoj; S-ro Orelo nenion reklamaciis al la kompanio; tial estas ja justa, ke hodiaŭ ĝi pagu al mi mian pluvombrelon!
 La direktoro, divenante la mensogon, ridetante diris:
 – Vi konsentos, sinjorino, ke estas vere mirinde, ke S-ro Orelo, kiu nenion postulis por damaĝo je kvincent frankoj, venu por postuli la repagon de pluvombrela flikado je kvin aŭ ses frankoj.
 Ŝi tute ne konsterniĝis, kaj replikis:
 – Pardonu, sinjoro, la damaĝo je kvin cent frankoj koncernis la monon de S-ro Orelo, sed la damaĝo je dek ok frankoj koncernas la monon de S-ino Orelo, kaj tio ne estas la sama afero.
 Komprenante, ke ŝi ne forlasos lian oficejon, kaj li estis perdonta sian tagon, li rezignacie demandis:
 – Nu, bonvolu diri al mi, kiamaniere la akcidento okazis.

Ŝi sentis la proksiman venkon, kaj ekrakontis:

– Jen, sinjoro: mi posedas en mia vestiblo ian aĵon el bronzo, en kiu oni metas la pluvombrelojn kaj la marŝbastonojn. Do antaŭ kelkaj tagoj, enirante, mi enen metis la pluvombrelon. Devas diri al vi, ke ĝuste super estas tabuleto por meti la kandelojn kaj la alumetojn. Mi etendas la brakon, kaj mi ekprenas kvar alumetojn. Mi frotas unu, ĝi estas fuŝa. Mi frotas alian, ĝi ekbrulas kaj tuj estingas. Mi frotas la trian, ĝi faras same.

La direktoro interrompis ŝin por meti spritaĵon:

– Ili do estis alumetoj de la registaro¹, ĉu ?

Ŝi ne komprenis, kaj daŭrigis:

– Tio povas esti. Ĉiuokaze estas, ke la kvara flamiĝis, kaj mi eklumigis mian kandelon; poste mi eniris en mian dormoĉambron por enlitiĝi. Sed post kvaronhoro ŝajnis al mi, ke oni brulodoris. Mi ĉiam timas la fajron. Ho! se iam ni suferus sinistran, tio ne estus mia kulpo ! Des pli post la kamenfajro, pri kiu mi parolis al vi, mi angoras. Do mi ellitiĝas, mi eliras, mi serĉas, mi flaras ĉien kiel ĉashundo, kaj fine mi ekvidas, ke mia pluvombrelo brulas. Probable ke alumeto falis enen. Vi vidas en kia stato tio igis ĝin...

La direktoro rezignaciis, li demandis:

– Je kiom vi taksas la damaĝon?

Ŝi restis ne parolante, ne aŭdacante difini prezon. Kaj ne volante ŝajni bagatelema, ŝi diris:

– Mendu ĝian flikadon vi mem. Mi fidas al vi.

Li malakceptis:

– Ne, sinjorino, mi ne povas. Diru al mi kiom vi petas.

– Sed... ŝajnas al mi... ke... Nu vidu, sinjoro, mi ne volas ŝteli vin, mi... ni faros tiel: mi kunportos mian pluvombrelon al fabrikisto, kiu rekovros ĝin per bona silko, per daŭrema silko, kaj mi alportos al vi la fakturon. Ĉu tio taŭgas al vi?

– Perfekte, sinjorino, konsentite. Jen noto por la kaso, kie oni repagos vian elspezon.

Kaj li etendis karton al S-ino Orelo, kiu ekkaptis ĝin, poste ŝi stariĝis, kaj dankante eliris, hastante troviĝi ekstere pro la timo, ke li ŝanĝu la decidon.

Nun ŝi gajpaŝe iradis tra la strato, serĉante pluvombrelan komerciston, kiu ŝajnus al ŝi eleganta. Kiam ŝi trovis butikon, kiu aspektis riĉa, ŝi eniris, kaj per aplomba voĉo diris:

– Jen difekta pluvombrelo. Rekovru ĝin per silko, per tre bona silko. Uzu tion, kion vi havas pli bone. Mi ne domaĝas la elspezon.

La 10an de februaro 1884

LA ĈAMBRO 11

Kiel ! Vi ne scias kial oni delokis S-ron la Unua Prezidanto Amando?

– Ne, tute ne.

– Cetere, li ankaŭ neniam sciis la kialon. Sed tio estas historio el la plej bizaraj.

– Bonvolu rakonti ĝin al mi.

– Ĉu vi ja memoras pri S-ino Amando, tiu bela, eta, magra brunulino, tiel belmaniera kaj delikata, kaj kiun oni nomis Sinjorinon Margareta en la tuta urbo Longa-Markolo ?

– Jes, perfekte.

– Nu, aŭskultu. Vi memoras ankaŭ kiom ŝi estis respektata, estimata, amata pli bone ol iu ajn en la urbo; ŝi scipovis akcepti, aranĝi feston aŭ filantropan faron, trovi monon por la malriĉuloj, kaj distri gejunulojn per mil rimedoj.

¹ Inter la jaroj 1872 kaj 1992, en Francio, la fabrikado de alumetoj koncernis monopolon de la Ŝtato.

Tamen, ŝi estis tre eleganta kaj tre koketa, sed tio estis platona koketeco kaj ĉarma provinca eleganteco, ĉar tiu malgranda virino estis provinculino, franda provinculino.

Sinjoroj la verkistoj, kiuj estas ĉiuj Parizanoj, ĉiamanierelaŭdkantas al ni la Parizaninon, ĉar ili konas nur ŝin, sed persone mi deklaras: la provinculino centoble plimulte valoras, kiam ŝi estas de supera kvalito.

La aspekto de la delikata provinculino estas tute aparta, pli diskreta ol tiu de la Parizanino, pli humila, kiu nenion promesas kaj multe donas, dum plejofte la Parizanino multe promesas kaj senvestigata nenion donas.

La Parizanino estas la triumfo de la eleganta kaj impertinenta malvero. La provinculino estas la modesteco de la vero.

Malnaiva eta provinculino, kun ŝia aspekto de lerta burĝino, ŝia trompa naiveco de pensionulino, ŝia rideto kiu nenion diras, kaj ŝiaj bonaj lertaj etaj pasioj, sed tenacaj, devas montri miloble pli da ruzo, fleksebleco, virina invento ol ĉiuj kuniĝantaj Parizaninoj, por sukcese kontentigi siajn gustojn, aŭ siajn malvirtojn, aperigante nenan suspekton, nenan klaĉon, nenan skandalon en la malgranda urbo, kiu rigardas al ŝi per ĝiaj tutaj okuloj, kaj ĝiaj tutaj fenestroj.

S-ino Amando estis tipo el tiu malofta, sed ĉarma raso. Neniam oni suspektis ŝin, neniam oni pensus, ke ŝia vivo ne estas klara kiel ŝia rigardo, ŝia kaŝtankolora, varma, travidebla rigardo, sed tiel honesta, sed kiel scii?

Do, ŝi uzis admirindan ruzaĵon, genian inventon, de mirinda inĝenieco kaj nekredebla simpleco.

Ŝi elektis ĉiujn amorantojn en la armeo, kaj konservis ilin dum tri jaroj, la daŭro de ilia restado en la garnizono. – Jen. – Ŝi ne havis amon, ŝi havis sensojn.

Tuj kiam nova regimento alvenis al Longa-Markolo, ŝi informiĝis pri ĉiuj oficiroj, kiuj aĝis inter tridek kaj kvardek jarojn, ĉar antaŭ tridek jarojn ili ne estas ankoraŭ sufiĉe diskretaj, kaj post kvardek jarojn, ofte ili malfortiĝas.

Ho! Ŝi konis tiel bone la kadrojn kiel la kolonelo. Ŝi ĉion sciis, ĉion, la intimajn kutimojn, la instruadon, la edukadon, la fizikajn kvalitojn, la eltenemon, la karakteron paciencan aŭ violentan, la riĉecon, la inklinon al la ŝparado aŭ la prodigemo. Poste ŝi faris sian elekton. Ŝi prefere elektis la virojn aspektante kvietajn, kiel ŝi, sed ŝi volis belajn virojn. Ŝi ankoraŭ volis, ke ili havas neniun konatan amrilaton, neniun pasion kiu povus lasi spurojn, aŭ fari kelkan bruon. Ĉar la viro, pri kiu oni citas la amojn, neniam estas viro ja diskreta.

Selektinte tiun, kiu amos ŝin dum la tri jaroj de la reglamenta restado, tiam sufiĉis al ŝi nurdoni signon.

Kiom da virinoj trafus en delikatan situacion, uzus ordinarajn rimedojn, vojojn de ĉiuj amorantinoj! Ili pasigus virojn tra ĉiuj etapoj de la konkerado kaj la rezisto, lasante iun tagon kisi la fingrojn, la sekvantan tagon la manartikon, la postan tagon la vangon, kaj poste la buŝon, kaj poste la ceteron.

Ŝia metodo estis pli rapida, pli diskreta, kaj pli certa. Ŝi aranĝis balon.

La elektita oficiro invitis danci la dommastrinon. Valsante, ebriigita pro la rapida movo de la danco, ŝi alpremiĝis al li kvazaŭ ŝi tuj cedis, kaj ĉirkaŭpremis lian manon per nerva kaj senĉesa premo.

Se li ne komprenis, tiam li estis nur stultulo, kaj ŝi pasis al la sekvanto, klasita dua numero en la listo de ŝiaj dezirindaj oficiroj.

Se li komprenis, tiam la afero estis farita, sen skandalo, sen kompromitaj galantaĵoj, sen multnombraj vizitoj.

Kio estas pli simpla kaj pli praktika?

Kiom la virinoj devus uzi similan procedon por komprenigi al ni, ke ni plaĉas al ili! Kiom tio forigus malfacilecojn, hezitadojn, parolojn, movojn, maltrankvilojn, konfuzon, miskomprenojn! Kiom ofte ni pasas flanke de ebla feliĉo, ne suspektante tiun ĉi, ĉar kiu povas

penetri la misteron de la pensoj, la sekretajn cedojn de la volo, la mutajn alvokojn de la karno, la tutan nekonataĵon de virina animo, kies buŝo restas silenta, okulo nepenetrebla kaj klara?

Tuj kiam li komprenis, li interkonsentis pri rendezvuo kun ŝi. Kaj ĉiam, ŝi atendigis lin dum unu monato aŭ ses semajnoj, por gvati lin, koni lin, kaj sin gardi pri kelka danĝera manko.

Dum tiu tempo, li streĉis la cerbon por scii kie ili povus senriske kune renkontiĝi, li elpensis malfacilajn kaj ne tre sekurajn kombinaĵojn.

Poste, okaze de kelka oficiala festo, ŝi mallaŭte diris al li:

– Nu! mardon vespere, je la naŭa, al la hotelo de la Ora Ĉevalo apud la remparoj, vojo de Vaŭzio, kaj demandu pri fraŭlino Klarisa. Mi atendas vin, nepre estu civile vestita.

Fakte, dum ok jaroj, ŝi havis meblitan ĉambron kun laŭjara pago en tiu nekonata gastejo. Estis ideo de ŝia unua amoranto, kaj ĉar ŝi trovis pratika la ideon, kiam foriris la ulo, ŝi konservis la neston.

Ho! nebona nesto, kvar muroj tapetaj per helgriza papero kun bluaj floroj, lito el abiligno, sub kurtenoj el muslino, brakseĝo zorge aĉetita de la gastejestro laŭ ŝia ordono, du seĝoj, tapiŝeto antaŭ la lito, kaj la kelkaj necesaj vazoj al la sinlavado! Kion krome necesis?

Sur la muroj, tri grandaj fotografiaj. Tri koloneloj sidantaj sur sia ĉevalo; la koloneloj de ŝiaj amorantoj! Kial? Ne povante konservi la rektan memorajon, la propran bildon de siaj amorantoj, eble tiamaniere ŝi volis nerekte konservi memoraĵojn?

Kaj, okaze de ĉiuj ŝiaj vizitoj al la Ora Ĉevalo, ĉu neniam ŝi estis rekonita de iu, vi diras al mi?

Neniam! Neniu!

La rimedo, kiun ŝi uzis estis simpla kaj admirinda. Ŝi elpensis kaj aranĝis serion de kunvenoj pri bonfarado kaj kompatato, kiujn ŝi ofte vizitis, kaj iafoje ne ĉeestis. La edzo konis ŝiajn piajn almozdonojn, kiuj multege kostis al li, kaj li vivis suspektante nenion.

Do, kiam la rendezvuo estis difinita, dum la la vespermanĝo, antaŭ la domservistaro, ŝi diris:

– Ĉivespere mi iros al la Asocio de la zonoj el flanelo por la paralizitaj maljunuloj.

Kaj ĉirkaŭ la oka ŝi eliris, eniris en la asociejon, tuj reeliris, trapasis diversajn stratojn, kaj kiam ŝi troviĝis sola en kelka strateto, en kelka malluma angulo kie ne estis oleolampo, ŝi demetis sian ĉapelon, anstataŭis ĝin per servistina kufo, kiun ŝi alportis sub sia manteleto, malfaldis blankan antaŭtukon alportitan per la sama maniero, nodis ĝin ĉirkaŭ sia talio, kaj portante en mantuko sian urban ĉapelon kaj la manteleton, kiu ĵus kovris ŝiajn ŝultrojn, ŝi trotante foriris, maltime, vestita per simpla robo, kiel simpla servistino, kiu faras aĉeton, kaj eĉ iafoje ŝi kuris, kvazaŭ ŝi urĝegas al si.

Kiu povus rekoni, en tiu maldika kaj vigla servistino, sinjorinon la unua prezidantino Amando?

Alveninte al la Ora Ĉevalo, ŝi supreniris al sia ĉambro, kies ŝi havis la ŝlosilon, kaj la dika gastejestro, mastro Truvo, vidante pasi ŝin de sia bufedo, murmuris:

– Jen fraŭlino Klarisa, kiu iras al siaj amoj.

Li ja supozis ion, la ruza dikulo, sed li ne serĉis plimulte scii pri tio; kaj, jes ja, li estis ja surpriza, kiam li eksciis, ke sia klientino estis sinjorino Amando, sinjorino Margereta, kiel oni diris en Longa-Markolo.

Nu, jen kiel okazis la horora malkovro.

Neniam fraŭlino Klarisa venis al siaj rendezvoj en du sinsekvaj vesperoj; neniam, neniam, ŝi estis tro ruza kaj tro singardema por fari tion. Kaj mastro Truvo ja sciis tion, ĉar eĉ unufoje, dum ok jaroj, li ne vidis ŝin reveni la postan tagon de vizito. Ofte eĉ, kiam li havis multajn gastojn, li luigis la ĉambron dum unu nokto.

Nu, dum la lasta somero, S-ro la Unua Prezidanto Amando forestis dum unu semajno. Tio okazis dum la julia monato, sinjorino havis ardojn, kaj ĉar ili ne povis timi esti surprizitaj,

la mardon vespere, forlasante sian amoranton, la belan komandanton de Varanĝelo, ŝi demandis al li, ĉu li volis revidi ŝin la postan tagon:

– Sendube!

Kaj ili interkonsentis, ke ili renkontiĝos merkrede je la kutima horo. Ŝi mallaŭte diris:

– Se vi alvenos la unua, mia karulo, vi kuŝiĝos por atendi min.

Ili sin kisis reciproke, kaj ili disiĝis.

Nu, la postan tagon, ĉirkaŭ la deka matene, dum mastro Truvo legis « La tabeloj de Longa-Markolo », la respublikan gazeton de la urbo, de malproksime, li kriis al sia edzino, kiu senplumigis kortobirdon en la korto:

– Jen la ĥolero en la lando. Hieraŭ viro mortis en Vovinjo.

Poste li ne plu pensis pri tio, estis multe da personoj en sia gastejo, kaj la aferoj glatege iris.

Ĉirkaŭ tagmezo, vojaĝanto piede venis, speco de turisto, li drinkis du absintaĵojn kaj mendis bonan tagmanĝon. Kaj, ĉar estis varmege, li almenaŭ sorbis unu litron da vino, kaj du litrojn da akvo.

Poste li trinkis sian kafon, sian malgrandan glason da brando, aŭ pli precize tri malgrandajn glasojn. Poste, sentis sin iom peza, li petis ĉambron por dormi dum unu aŭ du horoj. Ĉar ne plu estis unu sola ĉambro neokupita, la gastejestro, post konsultinte sian edzinon, donis al li la ĉambron de fraŭlino Klarisa.

La viro eniris en la ĉambron, kaj ĉirkaŭ la kvina vespere, ĉar oni ne vidis lin reeliri, la mastro iris vekti lin.

Kia miro, li mortis!

La gastejestro malsupreniris por konsulti sian edzinon:

– Imagu do, tiu tipo, kiun mi lokis en la ĉambron dek unu, mi estas certa, ke li mortis.

Ŝi alĉielen levis la brakojn:

– Neeblas! Sankta Dio! Ĉu tio estas la ĥolero?

Mastro Truvo skuis la kapon:

– Mi prefere kredus al cerba kongesto, konsiderante, ke li estas nigra kiel la vina feĉo.

Sed la edzino, konsternata, ripetis:

– Necesas tion ne diri, ĉar oni povas pensi pri la ĥolero. Iru deklari la morton, kaj ne parolu. Ni kunportos la korpon nokte, por ke oni ne vidu nin. Neniu vidos, neniu ekscios, kaj tiu afero estos kaŝita.

La viro murmuris:

– Fraŭlino Klarisa venis hieraŭ, do ĉivespere la ĉambro vakos.

Kaj li iris serĉi la kuraciston, kiu konstatis la forpason, pro kongesto post tro abunda manĝo. Poste estis interkonsentita kun la polica komisaro, ke oni kunprenos la kadavron ĉirkaŭ noktomezo, por ke nenion oni suspektas en la hotelo.

Estis apenaŭ la naŭa vespere, kiam S-ino Amando diskrete penetris en la ŝtuparon de la Ora Ĉevalo, vidita de neniu, tiun vesperon. Ŝi iris al sia ĉambro, malfermis la pordon, eniris. Kandelobulo brulis sur la kameno. Ŝi sin turnis al la lito. La komandato kusiĝis, sed li fermis la kurtenojn.

Ŝi prononcis:

– Momento! Mia karulo, mi alvenas.

Kaj ŝi malvestiĝis kun febra bruskeco, ĵetante siajn botetojn surplanken, kaj sian korseton sur la brakseĝon. Poste ŝia nigra robo, kaj ŝiaj malnoditaj juvoj cirkle falis ĉirkaŭ ŝi, kaj ŝi stariĝis, nur vestita per ĉemizo el ruĝa silko, kvazaŭ floro kiu ĵus disfloris.

Ĉar la komandanto ne diris vorton, ŝi demandis:

– Ĉu vi dormas, mia dikulo?

Li ne respondis, kaj ŝi ekridis murmurante:

– Ej! Li dormas, estas tro komike!

Ne demetinte siajn ŝtrumpojn, ŝtrumpoj el nigra aĵura silko, kaj kurante al la lito, ŝi rapide enŝoviĝis enen, ekkaptante plenbrake, kaj kisante plenlipe, por abrupte veki lin, la frostan kadavron de la vojaĝanto!

– Ĉu vi dormas, mia dikulo?

Dum unu sekundo, ŝi restis senmova, tro konsternata por kompreni ion. Sed la malvarmo de tiu senviva karno penetrigis, en ŝian propran karnon, kruelegan kaj senpensan teruron, antaŭ ol ŝia spirito povis komenci pripensi.

Ŝi eksaltis el la lito, tremetante dekape ĝispiede; poste, kurante al la kameno, ŝi ekkaptis la kandelon, revenis kaj rigardis! Kaj ŝi ekvidis aĉegan vizaĝon, kiun ŝi tute ne konis, nigran, ŝvelan, kun la okuloj fermitaj, kaj horora grimaco de la makzelo.

Ŝi eligis krion, unu el tiuj akraj kaj senfinaj krioj, kiujn ĵetas la virinoj kiam ili teruriga; kaj lasante fali sian kandelon, ŝi malfermis la pordon, fuĝis, nuda, tra la koridoro, daŭrigante hurli per timiga maniero.

Vojaĝa komizo, kiu okupis la ĉambron numero 4, tuj eliris kun nur siaj ŝtrumpetoj sur la piedoj, kaj enbrake alprenis ŝin.

Konsternata, li demandis:

– Kio estas, bela infano?

Konfuzegata, ŝi balbutis:

– Oni... oni... oni.. mortigis iun... en mia ĉambro... Aliaj vojaĝantoj aperis. La gastejestro mem alkuris. Kaj subite la komandanto vidigis sian altan staturon ĉe la fino de la koridoro.

Tuj kiam ŝi ekvidis lin, ŝi impetis al li kriante:

– Savu min, savu min, Gontrano... Oni mortigis iun en nia ĉambro.

La klarigoj estis malfacilaj. Tamen, S-ro Truvo rakontis la veron kaj petis, ke oni tuj liberigos fraŭlinon Klarisa, pri kiu li respondecis sur sia kapo. Sed la vojaĝa komizo kun siaj ŝtrumpetoj sur la piedoj, post ekzameninte la kadavron, asertis ke temis pri krimo, kaj li konvinkis la aliajn gastojn, ke ili malebligas foriri fraŭlinon Klarisa kaj ŝian amoranton.

Ili devis atendi la alvenon de la polica komisaro, kiu liberigis ilin, sed kiu ne estis diskreta.

La sekvantan monaton, S-ro la Unua Prezidanto Amando havis avancon, kaj novan rezidejon.

Je la 9a de decembro 1884.

LA KAZO DE S-INO LUNO

Al Georges Duval [Georgo /Dyval/]

La paciga juĝisto, dika, kun okulo fermita, kaj la alia apenaŭ malfermita, malkontentamiene aŭskultas la plendantojn. Iafoje li eligas specon da grumblado, kiu perfidas lian opinion, kaj li interrompas la plendantojn per gracila voĉo, kiel de infano, por meti demandojn.

Li ĵus findecidis la aferon de S-ro Beleto kontraŭ S-ro Etpaŝo, pri la limŝtono de kampo, kiun senatente delokis la ĉaristo de S-ro Etpaŝo, dum il plugadis.

Li alvokas la aferon Hipolito Lakorto, sakristiano kaj ladaĵisto, kontraŭ S-ino Celesta-Cezarina Luno, vidvino de Antimo-Izidoro.

Hipolito Lakorto aĝas kvardek kvin jarojn; granda, malgrasa, havante longajn harojn kaj razitan barbon kiel ekleziulo, li parolas per malrapida, treniĝa kaj kantanta voĉo.

S-ino Luno ŝajnas aĝi kvardek jarojn. Belstatura kiel luktisto, ŝia mallarĝa kaj strikta robo ŝvelas el ĉie. Ŝiaj kolosaj koksoj subportas antaŭe elstarantan bruston, kaj malantaŭe

skapolojn grasajn kiel mamojn. Ŝia larĝa kolo subtenas kapon kun elstaraj trajtoj, kaj ŝia plenvoĉo, sen esti basa, eligas notojn, kiuj vibrigas la vitrojn kaj la timpanojn. Graveda, ŝi prezentas antaŭe gigantan ventron kiel montaron.

La favoraj atestantoj atendas sian vicon.

S-ro la paciga juĝisto ekas la pridemandon.

«Hipolito Lakorto, prezentu vian reklamacion.»

La plendanto ekparolas.

«Jen, sinjoro la paciga juĝisto. Estos naŭ monatoj en la tago de Sankta-Mikelo, kiam S-ino Luno venis trovi min, iun vesperon, dum mi ĵus sonorigis la anĝeluson, kaj ŝi eksponis al mi sian situacion rilate al sia sterileco...

LA PACIGA JUĜISTO. – Estu pli eksplicita, mi petas vin.

HIPOLITO. – Mi klarigas, sinjoro la juĝisto. Nu, ŝi deziris infanon, kaj ŝi petis mian partoprenon. Mi ne kontraŭis, kaj ŝi promesis al mi cent frankojn. La afero estis konsentita kaj reguligita, sed hodiaŭ ŝi kontestas sian promeson. Mi venas antaŭ vi por postuli mian meritaĵon, sinjoro la paciga juĝisto.

LA PACIGA JUĜISTO. – Mi tute ne komprenas vin. Vi diras, ke ŝi volis infanon, ĉu? Kiel? Kia speco de infano? Ĉu infano por adopti ĝin?

HIPOLITO. – Ne, sinjoro la juĝisto, unu nova.

LA PACIGA JUĜISTO. – Kion vi volas diri per tiuj vortoj: «Unu nova?»

HIPOLITO. – Mi volas diri naskotan infanon, kiun ni koncipus kune, kiel se ni estus edzo kaj edzino.

LA PACIGA JUĜISTO. – Vi ege surprizas min. Kion ŝi celis, kiam ŝi faris al vi tian nenormalan proponon?

HIPOLITO. – Sinjoro la juĝisto, unuatempe la celo ne evidentiĝis al mi, kaj mi ankaŭ estis iom mirigita. Sed ĉar mi nenion faras senpripense, mi volis penetriĝi pri ŝiaj kialoj, kaj ŝi rakontis ilin al mi.

Nu, ŝia edzo, Antimo-Izidoro, kiun vi konis kiel vi kaj mi, mortis la antaŭan semajnon, kaj liaj tutaj riĉaĵoj devis returne iri al lia familio. Do, ĉar la afero ĉagrenis ŝin, pro la mono, ŝi iris konsulti juriston, kiu informis ŝin koncerne la kazon de naskiĝo en la dek venontaj monatoj. Mi volas diri, ke se ŝi akuŝus dum la dek monatoj post la forpaso de Antimo-Izidoro, la frukto de ŝia internaĵo estus rigardata kiel legitima, kaj rajtigus al la heredo.

Ŝi tuj decidis efektiviĝi tiun aferon, kaj ŝi venis trovi min ĉe la elirejo de la preĝejo, kial mi honoris diri tion al vi, konsiderante ke mi estas la legitima patro de ok infanoj, ĉiuj vivipovaj, kies mia unuenaskito estas spicisto en Caen, departemento de Kalvadoso, kaj li estas unuigita per legitima geedzeco kun Viktoria-Elizabeta Rabu...

LA PACIGA JUĜISTO. – Tiuj detaloj estas neutilaj. Reiru al la ĉefajĵo.

HIPOLITO. – Mi reiras al ĝi, sinjoro la juĝisto. Do ŝi diris al mi: «Se vi sukcesos, mi donos al vi cent frankojn, tuj kiam la kuracisto konstatos mian gravedecon.»

Nu, mi pretiĝis, sinjoro la juĝisto, por plene kontentigi ŝin. Post ses semajnoj aŭ du monatoj, efektive, mi plezure eksciis la sukceson. Sed kiam mi postulis la cent frankojn, ŝi rifuzis doni ilin al mi. Mi denove insiste petis ilin plurfoje, sed mi ricevis nenion. Ŝi eĉ insulte nomis min flibustro kaj impotenta. Sed por pruvi la kontraŭon, sufiĉas rigardi ŝin.

LA PACIGA JUĜISTO. – Kion vi havas por diri, virino Luno?

SINJORINO LUNO. – Mi diras, sinjoro la paciga juĝisto, ke tiu viro estas flibustro!

LA PACIGA JUĜISTO. – Kia pruvo vi alportas por apogi tiun aserton?

SINJORINO LUNO (ruĝa, sufokiĝanta, balbutanta). – Kia pruvo? kia pruvo? Mi ne havas unu pruvon, sed havas multajn verajn pruvojn, ke la infano ne estas al li. Ne, ne al li, sinjoro la juĝisto, mi ĵuras tion sur la kapon de mia mortinta edzo, ne al li.

LA PACIGA JUĜISTO. – Kiu estas do la patro, en tiu kazo?

SINJORINO LUNO (balbutante pro la kolero). – Ĉu mi scias, ĉu mi scias tion? Ĉiuj, kompreneble. Nu vidu, jen miaj atestantoj, sinjoro la juĝisto; jen ĉiuj. Ili estas ses. Pridemandu al ili, pridemandu. Ili respondos...

La PACIGA JUĜISTO. – Kvietiĝu, sinjorino Luno, kvietiĝu kaj respondu senpasie. Kiajn kialojn vi havas por dubi, ke tiu viro ne estas la patro de la infano, kiun vi portas?

SINJORINO LUNO. – Kiajn kialojn? Mi havas cent por unu, cent, ducent, kvincent, dek mil, unu miliono, da kialoj. Konsiderante, ke post mi faris la proponon, kiun vi scias, kun promeso de cent frankoj, mi eksciis ke li estis kokrito, malgraŭ mia respekto al vi, sinjoro la juĝisto, kaj ke li ne estas la patro de siaj infanoj, eĉ ne la patro de unu.

HIPOLITO LAKORTO (egalanime). – Tio estas mensogoj.

SINJORINO LUNO (furiozigata). – Mensogoj! mensogoj! Se oni povas diri. Pruve ke lia edzino intime kuŝis kun ĉiuj, tion mi diras al vi, kun ĉiuj. Vidu, jen miaj atestantoj, sinjoro la paciga juĝisto. Igu depozicii ilin.

HIPOLITO LAKORTO (senemocie). – Tio estas mensogoj.

SINJORINO LUNO. – Se oni povas diri! Kaj la rufaj, ĉu estas vi la patro de la rufaj?

LA PACIGA JUĜISTO. – Ne personajn atakojn, mi petas vin, se ne mi devus severe puni.

SINJORINO LUNO. – Do, pro la dubo, kiu ekkaptis min pri liaj kapablecoj de generinto, mi diris al mi, kiel oni diras, ke du antaŭzorgoj estas preferinde ol unu, kaj mi rakontis mian aferon al Cezero Lapikilo, kiu estas tie ĉi, mia atestanto, kiu diris al mi: «Je via dispono, sinjorino Luno», kaj kiu helpis al mi, por la okazo se Hipolito malsukcesus. Sed kiam la aliaj atestantoj eksciis, ke mi volis antaŭgardi min en tiu afero, mi trovus, se mi volus, pli cent volontulojn, sinjoro la juĝisto.

La granda, kiun vi vidas tie, tiu kiu nomiĝas Lukaso Kandelingo, tiam ĵuris al mi, ke mi malpravus doni la cent frankojn al Hipolito Lakorto, ĉar li ne pli faris ol la aliaj, kiuj nenion postulis.

HIPOLITO. – Tiam vi ne devis promesi ilin al mi. Mi ja esperis ilin, sinjoro la juĝisto. Kun mi, ne estas trompkonfuzo: promeso estas ŝuldo.

SINJORINO LUNO (frenezega). – Cent frankojn! cent frankojn! Cent frankojn por tio, flibustro, cent frankojn! Ili nenion petis de mi, ili, nenio el nenio. Vidu, jen ili, ili estas ses. Pridemandu ilin, sinjoro la paciga juĝisto, ili respondos nepre, ili respondos. (Al Hipolito): «Aŭskultu do ilin, flibustro, se ili ne egalas vin. Ili estas ses, sed mi povus havi cent, ducent, kvincent, tiom kiom mi volus, senpage, flibustro!»

HIPOLITO. – Eĉ se ili estus cent mil!...

SINJORINO LUNO. – Jes, cent mil, se mi volus...

HIPOLITO. – Mi tamen plenumis mian devon... tio ne ŝanĝas niajn interkonsentojn.

SINJORINO LUNO (frapante sur sian ventron per siaj du manoj) – Nu, pruvu ke estas vi, pruvu tion, pruvu do tion, flibustro. Mi defias vin pri tio!


HIPOLITO (egalanime). – Eble mi ne pliestas la patro ol alia. Tio ne malebligas, ke vi promesis al mi cent frankojn. Poste vi japovis amindumi kun ĉiuj. Tio ŝanĝas nenion. Mi ja farus al vi infanon tute sola.

SINJORINO LUNO. – Ne veras! Flibustro! Pridemandu miajn atestantojn, sinjoro la paciga juĝisto. Nepre ili respondos.

La paciga juĝisto alvokas la favorajn atestantojn. Ili estas ses, ruĝaj, kun la brakoj malstreĉe pendantaj, timigataj.

LA PACIGA JUĜISTO. – Lukaso Kandelingo, ĉu vi havas kialojn por supozi, ke vi estas la patro de la infano, kiun S-ino Luno kunportas en sia sino?

LUKASO KANDELINGO. – Jes, sinjoro.



LA PACIGA JUĜISTO. – Celesteno-Petro Siduano, ĉu vi havas kialojn por supozi, ke vi estas la patro de la infano, kiun S-ino Luno kunportas en sia sino?

CELESTENO-PETRO SIDUANO. – Jes, sinjoro.

(La kvar aliaj atestantoj simile depozicias tiamaniere.)

La paciga juĝisto, post medito prononcas:

«Konsiderante, ke se Hipolito Lakorto havas kialojn por pensi, ke li estas la patro de la infano postulita de S-ino Luno, la nomataj Lukaso Kandelingo, ktp., ktp., havas analogajn kialojn, se ne hegemoniaj, depostuli la saman patrecon;

«Sed konsiderante, ke S-ino Luno komence petis la helpon de Hipolito Lakorto, kompanse interkonsentitan monkompenson de cent frankoj;

«Konsiderante tamen, ke se oni povas supozi totala la sincerecon de sinjoro Lakorto, estas permesita kontesti lian striktan rajton devontigi sin de tiamaniere, ĉar la plendanto estas edziĝinta, kaj nepre devas, pro la leĝo, restadi fidela al sia legitima edzino;

«Konsiderante krome, ke ktp., ktp., ktp.,

«Kondamnas S-inon Luno pagi dudek kvin frankojn de damaĝkompenso al sinjoro Hipolito Lakorto, pro perdo da tempo kaj eksterkutima delogado.»

Je la 21a de aŭgusto 1883

LA DUDEK KVIN FRANKOJ DE LA SUPERULINO

Ha! Certe ja, kiom li estis amuza, la ulĉjo Pavijo, kun siaj grandaj araneaj kruroj, kaj sia malgranda korpo, kaj siaj longaj brakoj, kaj sia pinta kapo kun tufo de ruĝaj haroj superstaranta sur la supro de la kranio.

Li estis klaŭno, kamparana klaŭno, natura, naskita por fari farsojn, ridigi, por ludi rolojn, simplajn rolojn, ĉar li estis filo de kamparano, kaj li mem ankaŭ kamparano, scipovante apenaŭ legi. Ha! Jes, la bona Dio kreis lin por amuzi la aliajn, la kamparajn kompatindulojn, kiuj ne havas teatrojn, nek festojn; kaj li konscie amuzis ilin. En la trinkejo, oni drinkregalis lin, por ke li restu, kaj li bravege drinkadis, ridante kaj ŝercante, blagante ĉiujn, ofendante neniun, dum oni ridegis ĉirkaŭ li.

Li estis tiel amuza, ke la knabinoj ne rezistis al li, tiom ili ridis, kvankam li estis tre malbela. Blagante, li kuntiris ilin malantaŭ muron, en fosaĵon, en stalon, poste li tiklis ilin, kaj insiste petis, kun diraĵoj tiom komikaj, ke ili sin tenis la flankojn pro ridego, repuŝante lin. Tiam li kapriolis, faris mienon kvazaŭ li volus pendumi sin, kaj ili ridegis, kun larmoj en la okuloj; li elektis la favoran momenton, kaj faligis ilin tiel lerte, ke ĉiuj subkuŝis, eĉ tiuj, kiuj spitis lin, cele al amuziĝi.

Do, cirkaŭ la juniofino, li dungigis sin por rikolti ĉe mastro La Harivo, proksime de Rouville [*Ruvil'*]. Dum tri plenaj semajnoj, li ĝojigis la gerikoltistojn, per siaj farsoj, tiom tage, kiom nokte. Tage oni vidis lin en la ebenaĵo, meze de la falĉitaj spikoj, oni vidis lin kapvestita per malnova pajla ĉapelo, kiu kaŝis lian rufetan hartufon, levprenante per siaj longaj maldikaj brakoj kaj garbigante la flavan tritikon; poste haltante por ŝajnigi komikan geston, kiu ridigis, tra la kamparo, la popolamason de la gelaboristoj, kiuj rigardadis lin. Nokte, kiel rampa besto, li enŝoviĝis en la pajlon de la grenejoj, kie la virinoj dormis, kaj liaj manoj vagis, eligis kriojn, okazigis tumultojn. Oni forpelis lin per lignoŝuofrapoj, kaj li kvarpiede fuĝis, simila al fantasta simio, meze de la ŝprucadoj de gajeco de la tuta samĉambranaro.

La lastan tagon, dum la ĉaro kun la gerikoltistoj, rubandornamita kaj plena de sakfajfila muziko, krioj, kantoj, ĝojo kaj ebrieco, iris sur la granda blanka vojo, trenata per la malrapida paŝo de ses grizmakulaj ĉevaloj, kondukata de knabego vestita de kitelo, kun

kokardo sur la kaskedo, en la ĉaro Pavijo, meze de la sterniĝantaj virinoj, dancis paŝon de ebria satiruso, kiu gapigis sur la talusoj de la farmobienoj la nazofluajn knabetoj, kaj la konsternatajn kamparanojn pro lia neverŝajna kompleksio.

Subite, alvenante al la barilo de la farmobieno de mastro La Harivo, li eksaltis levante la brakojn, sed malfeliĉe refalante li frapiĝis kontraŭ la randaĵo de la longa ĉaro, rulfalis super ĝi, falis sur la radon, kaj resaltis sur la vojon.

Liaj kamaradoj impetis. Li ne plu moviĝis, kun okulo fermita, la alia malfermita, palega pro timo, liaj grandaj membroj etenditaj en la polvo.

Kiam oni tuŝis lian dekstran gambon, li ekeligis kriojn, kaj kiam oni volis ekstarigi lin, li falis.

– Mi ja pensas, ke li havas stilzon frakasitan, diris viro.

Fakte, li havis gamban frakturon.

Mastro La Harivo kuŝigis lin sur tablon, kaj rajdanto rapidas al Rouville por serĉi la kuraciston, kiu alvenis post unu horo.

La farmisto estis tre malavara, kaj anoncis, ke li pagos la kuracadon de la viro al la malsanulejo.

La doktoro kunportis do Pavijon en sia veturilo, kaj metis lin en malsanulan dormejon, farbitan per kalko, kie oni reartikigis lian ostrompiĝon.

Tuj post kiam li komprenis, ke li ne mortos, ke li estos flegita, dorlotita, ke li resaniĝos, kaj li estos nutrita, farante nenion, surdorse, inter du littukoj, abunda ĝojo ekkaptis Pavijon, kaj li ekridis per silenta kaj kontinua rido, kiu montris liajn difektitajn dentojn.

Tuj kiam religulino alproksimiĝis al lia lito, li grimacis pro kontentiĝo, palpebrumis, tordis sian buŝon, movis sian nazon, kiun li havis tre longan kaj moveblan laŭvole. Liaj dormejaj najbaroj, kvankam ili estis malsanaj, ne sukcesis deteni sin de rido, kaj la supera religulino ofte venis al lia lito por travivi momenton de amuzo. Por ŝi, li trovis pli komikajn farsojn, originalajn ŝercojn, kaj ĉar li povis ludi ajnan rolon por plaĉi al ŝi, liparolis pri la bona Dio kun seriozaj mienoj de homo, kiu scias la momentojn, kiam li ne devas plu gajeme ŝerci.

Iun tagon, li decidis kanti al ŝi kanzonojn. Ŝi estis kontentega, kaj pli ofte revenis; poste, por utiligi lian voĉon, ŝi alportis al li kantolibron. Tiam oni vidis lin, sidanta en lia lito, ĉar li jam komencis moviĝi, false ekkanti la laŭdojn al la Eternulo, Maria kaj la Sankta Spirito, dum tiu dika supera fratulino, staranta ĉe liaj piedoj, takton signis per fingro, donante al li samtempe la tonnuancon. Tuj post kiam li povis marŝi, la superulino proponis al li restadi dum kelka plia tempo, por ke li kantu la diservojn en la kapelo, servante samtempe la meson, kaj plenumante ankaŭ la funkciojn de sakristiano. Li konsentis. Kaj dum plena monato, oni vidis lin, vestita per blanka surpliso, lametante ekkanti la responsoriojn kaj la psalmojn kun kapteniĝoj tiom plaĉaj, ke la nombro de la fideluloj pliiĝis, ili forlasis la paroĥon por ĉeesti al la vesproj de la malsanuleja kapelo.

Sed, ĉar ĉio finiĝas en tiu mondo, kiam li estis tute resaniĝinta, ja necesis, ke oni forpetu lin. La superulino, por danki lin, donacis al li dudek kvin frankojn.

Tuj post kiam Pavijo vidis sin en la strato kun tiu poŝmono, li sin demandis pri tio, kion li tuj faros. Ĉu li revenus al la vilaĝo? Certe! Sed komence li tuj trinkos glason da brando, tio kio ne okazis al li jam de longtempe, kaj li eniris en trinkejon. Li venis al la urbomaloŝte, ne pli ol unu aŭ dufoje ĉiujare, kaj li aparte memoris pri unu el tiuj vizitoj, pri konfuza kaj ebriiga memoraĵo de orgio.

Do li mendis glason da supera brando, kiun li trinkis per unu gluto por lubriki la pasejon, poste li verŝigis al si duan por koni la guston.

Tuj post kiam la brando, forta kaj pipra, tuŝis lian palaton kaj la langon, vekante pli vigla, post tiu longa sobereco, la ŝatatan kaj deziratan senton de la alkoholo, kiu karesas, kaj pikas, kaj aromigas, kaj bruligas la buŝon, li komprenis, ke li trinkos la botelon, kaj tuj

demandis kiom ĝi kostis, por ŝpari ne aĉetante podetale. Oni kalkulis ĝin je tri frankoj, kiujn li pagis; poste li komencis ebriiĝi kun trankvileco.

Tamen li drinkadis metode, volante konservi sufiĉe da konscio por profiti aliajn plezurojn. Tial kiam li eksentis, ke li atingis staton, kiam ŝajnas, ke fumtuboj salute klinas al si, li stariĝis kaj foriris, ekserĉante ĉiesulinejon.

Li trovis ĝin, ne facile, post demandinte tion al ĉarkondukisto kiu ne sciis, al lerterportisto kiu malbone informis lin, al panisto kiu eksakris insulte nomante lin permaljuna porkulo, kaj fine al militisto, kiu komplezeme kondukis lin tien, instigante lin elekti la Reĝinon.

Kvankam estis apenaŭ tagmeze, Pavijo eniris en tiun ĝuejon, kie li estis akceptita de domservistino, kiu volis forpeli lin. Sed li ridigis ŝin per grimaco, vidigis tri frankojn, la normala prezo de la apartaj konsumoj en la ejo, kaj malfacile sekvis ŝin laŭ tre malluma ŝtuparo, kiu kondukis al la unua etaĝo.

Tuj post kiam li eniris en dormoĉambron, li postulis la alvenon de la Reĝino, kaj atendis ŝin drinkante denove brandon direkte al la botelkolo.

La pordo malfermiĝis, ĉiesulino aperis. Ŝi estis granda, dika, ruĝa, giganta. Per memfida ekrigardo, ekrigardo de spertulo, ŝi arogante rigardis la ebriulon sidaĉantan sur seĝo, kaj diris al li:

– Ĉu vi ne hontas je tia horo?

Li balbutis:

– Pri kio, princino?

– Sed tedi unu sinjorinon, antaŭ ol ŝi eĉ ne manĝis la supon.

Li volis ŝerci:

– Ne estas horo por la bravuloj.

– Ankaŭ ne estas horo pour ebriiĝi, maljuna funelo.

Pavijo koleriĝis:

– Mi *n'estas* funelo, unue, kaj poste mi *n'estas* ebria.

– Ne ebria, ĉu?

– Ne, mi *n'estas* ebria.

– Ne ebria, sed vi ne povus eĉ staradi.

Ŝi rigardis al li, kun rabia kolero de virino, kies vivkunulinoj tagmanĝas.

Li stariĝis:

– Sed, sed, eĉ polkon mi dancus.

Kaj, por prui sian firmecon, li supreniris sur la seĝon, piruetis kaj saltis sur la liton, kie liaj dikaj ŝlimaj ŝuoj stampis du malbelegajn makulojn.

– Ha! aĉulo! kriis la knabino.

Impetante, ŝi ĵetis al li pugnobaton en la ventron, tian pugnobaton, ke Pavijo perdis la ekvilibron, renversiĝis kontraŭ la piedoj de la kuŝejo, faris kompletan kapriolon, refalis sur la komodon kuntrenante kun si la kuveton kaj la akvopoton, poste falegis surplanken eligante hurladojn.

La bruoj estis tiom fortega, kaj liaj krioj tiom akraj, ke la tuta hejmanaro alkuris, la mastro, la mastrino, la domservistino kaj la personaro.

Unue, la mastro volis levpreni la viron, sed tuj kiam li starigis lin, la kamparano denove perdis la ekvilibron, kaj kolere kriadis, ke li havis la gambon rompitan, la alian, la bonan, la bonan!

Tio estis vera. Oni kuris serĉi kuraciston. Ĝuste estis tiu, kiu jam flegis Pavijon en la domo de mastro La Harivo.

– Kiel, estas ankoraŭ vi? Li diris.

– Jes, sinjoro.

– Kion vi havas?

- La alian, kiun same oni rompigis al mi, sinjoro la doktoro.
- Kiu faris tion al vi, mia bravulo?
- Unu inaĉo, ja kompreneble.

Ĉiuj aŭskultis. La ĉiesulinoj vestitaj nur per negliĝo, ne kombitaj, kun la buŝo ankoraŭ grasa pro la interrompita manĝo, la domestrino furioza kaj la domestro maltrankvila.

– Tio tuj faros bedaŭrindan aferon, diris la medicinisto. Vi scias, ke la municipa konsilio ne bone estimas vin. Estus preferinde por vi, ke oni ne parolas pri tiu afero.

– Kiel fari? demandis la mastro.

– Sed, plejbone estus sendi tiun viron al la malsanulejo, de kie il eliris, kaj ankaŭ pagi lian kuracadon.

La domestro respondis:

– Mi preferas tamen tion, ol havi malagrabraĵojn.

Do Pavijo, post unu duonhoru, revenis ebria kaj plendema en la dormejon, el kiu unu horon antaŭe li eliris.

La superulino levis la brakojn, afliktata, ĉar ŝi amis lin, kaj ridetante, ĉar tio ne malplaĉis al ŝi revidi lin.

– Nu! mia bravulo, kion vi havas?

– La alian gambon frakasitan, sinjorino la fratulino.

– Ha! ĉu do vi ree surgrimpis sur veturilon de pajlo, granda ŝerculo?

Kaj Pavijo, konfuza kaj ruza, balbutis:

– Ne... ne... ne ĉifoje... ne ĉifoje... Ne... ne... Mi ne kulpas, ne kulpas... Estas pajlomatraco, kiu estas la kaŭzo.

Ŝi ne povis obteni alian klarigon, kaj neniam ŝi sciis, ke ŝiaj dudek kvin frankoj estis la kialo de tiu remalsaniĝo.

Je la 28a de marto 1888

LA KRIMO AL LA ULĈJO BONIFACO

Tiun tagon la leterportisto Bonifaco, elirante el la poŝtoŝtanco, konstatis ke lia rondvizito daŭros malpli longe ol kutime, kaj li tre ĝojis pro tio. Lia komisiono konsistis en la distribuado de la poŝtaĵoj en la ĉirkaŭa kamparo de la vilaĝego Urbĝiro, kaj kiam vespere li revenis hejmen, per sia laca longa paŝo, iafoje li marŝadis dum pli ol kvardek kilometroj.

Do la distribuado estus rapide farita; li eĉ povus iom gapvagi survoje, kaj reveni hejmen ĉirkaŭ la tria posttagmezo. Kia bonŝanco!

Li eliris el la vilaĝego per la vojo de Senemaro, kaj komencis sian taskon. Estis en junio, la verda kaj floranta monato, la vera monato de la ebenaĵoj.

La viro estis vestita per sia blua kitelo, kaj kapvestita per sia nigra kepo, ornamita per ruĝa galono. Li trapasis kampojn de kolzo, aveno aŭ tritiko, tra mallarĝaj vojetoj, kaŝata ĝis la ŝultroj per la rikoltoj; kaj lia kapo, ĝuste super de la spikoj, ŝajnis flosi sur kvieta kaj verdanta maro, kiun leĝera venteto ondadigis milde.

Li eniris en la farmobienojn tra la bariero el ligno, kiu stariĝis en la talusoj, kiujn ombris du vicoj de fagoj, kaj nome salutante la kamparon: «Bonan matenon, mastr' Ŝiko», Bonifaco prezentis al li lian gazeton "La Eta Normando". La farmisto viŝis sian manon sur sia poŝtaĵa kuloto, ricevis la paperfolion, kiun li enŝovis en sian poŝton, por komforte tralegi ĝin post la meztagmanĝo. La hundo, kiu loĝis en bareleto, piede de kliniĝinta pomarbo, furioze vebojis tirante sian ĉenon; kaj la piediranto, sen sin turni, denove foriris per sia milita

irmaniero, rapidigante siajn paŝojn, kun la maldekstra brako sur sia ledsako, kaj la dekstra manovrante sian irbastonon, kiu same kiel li marŝis per kontinua kaj hasta maniero.

Li distribuis siajn presaĵojn kaj leterojn en la vilaĝeto de Senemaro, kaj li ekvojiris tra la kampoj por alporti liajn postaĵojn al la impostkolektisto, kiu loĝis en malgranda izolita domo je unu kilometro de la vilaĝego.

S-ro Ŝapujo estis nova impostkolektisto, alveninta la lastan semajnon, kaj novedzo.

Li ricevis Parizan gazeton, kaj iafoje la leterportisto Bonifaco, kiam tempon li havas, ekrigardis la presaĵon, antaŭ transdoni ĝin al la adresato.

Do, li malfermis sian ledsakon, ekprenis la gazeton, glitigis ĝin el ĝia papera cirkla bendo, malfaldis ĝin, kaj eklegis samtempe ke li marŝis. La unua paĝo ne multe interesis lin; li estis indiferenta al la politiko, li ĉiam ignoris la financon, sed la diversaĵoj pasiigis lin.

Tiun tagon ili abundis. La legado de la rakonto de krimo farita ĉe la loĝejo de ĉasgardisto agitis lin tiel forte, ke li haltis meze de trifolia kampo, por relegi ĝin malrapide. La detalaĵoj estis teruraj. Arbohakisto, kiu matene pasis apud la arbaristejo rimarkis iom da sango sur la sojlo, kvazaŭ iu sangis per la nazo. « Sendube, ke nokte la ĉasgardisto mortigis kelkan kuniklon », pensis la arbohakisto; sed alproksimiĝante li ekvidis, ke la pordo restadis duonfermita, kaj la seruro estis rompita.

Tiam la timo ekkaptis lin, li kuris al la vilaĝo por informi la vilaĝestron, kiu akompanigis sin de la kampogardisto kaj la instruisto; kaj la kvar viroj revenis kune al la krimejo. Ili trovis la arbariston buĉitan antaŭe de la kameno, lian edzinon strangolitan sub la lito, kaj ilian etan filinon, kiu estis sesjara, sufokitan inter du matracoj.

La leterportisto Bonifaco restadis tiom emociita al la penso de tiu murdo, kies ĉiuj hororaj cirkonstancoj sinsekve aperis al li, ke li sentis malfirmecon en la kruroj, kaj li laŭte eldiris :

– Dia tondro! Tamen estas uloj, kiuj estas ja aĉuloj!

Poste li remetis la gazeton en la bendo, kaj ree iris, kun la kapo plena de la krimvidado. Li baldaŭ atingis la loĝejon de S-ro Ŝapujo; li malfermis la barieron de la ĝardeneto, kaj alproksimiĝis al la domo. Temis pri malalta konstruaĵo, kiu konsistis el teretaĝo, kaj estis kovrita per mansarda tegmento. Ĝi distancis almenaŭ kvincent metrojn de la plej najbara domo.

La leterportisto supreniris la du peronŝtupojn, metis la manon sur la seruron, provis malfermi la pordon, kaj konstatis, ke ĝi estis ŝlosita. Tiam li rimarkis, ke la ŝutroj tute ne estis malfermitaj, kaj ke ĉitage neniu ankoraŭ estis elirinta.

Maltrankvilo ekkaptis lin, ĉar S-ro Ŝapujo, de post sia alveno, kutime ellitiĝis sufiĉe frumatene. Bonifaco elpoŝigis sian poŝhorloĝon. Estis ankoraŭ nur la sepa kaj dek matene, do li alvenis antaŭtempe ĉirkaŭ unu horo. Sed tute egale, la impostkolektisto devus jam estis staranta.

Tiam li faris rondiron ĉirkaŭ la domo, marŝante singarde, kvazaŭ se li riskus ajnan danĝeron. Li rimarkis nenion suspektindan, nur postsignojn de viraj paŝoj en fragbedo.

Sed subite, pasante antaŭ fenestro, li restis senmova, paralizita pro la angoro. Oni ĝemis en la domo.

Li alproksimiĝis, kaj transpaŝante timianan borderon, almetis sian orelon kontraŭ la ŝutro por pli bone aŭskulti; ja certe oni ĝemis. Li ja bone aŭdis longajn dolorajn sopirĝemojn, specon de stertorado, luktadobruon. Poste, la ĝemadoj fariĝis pli laŭtaj, pli ripetataj, intensiĝis ankoraŭ, kaj ŝanĝiĝis en krioj.

Tiam Bonifaco ne plu dubis, krimo okazis en tiu momento, ĉe la impostkolektisto, kaj li forkuregis, retrapasis la ĝardeneton, impetis tra la ebenaĵon, tra la rikoltoj, kurante senspire, skuante sian ledsakon, kiu batis al li la lumbojn, kaj li alvenis, lacega, anhelanta, freneza, al la pordo de la ĝendarmejo.

La brigadestro Maloturo riparis rompitan seĝon, per najloj kaj martelo. La ĝendarmo Rotiero tenis inter siaj kruroj la difektitan sidilon, kaj starigis najlon sur rando de rompo; tiam la brigadestro, maĉante sian lipharon kun la okuloj rondaj kaj malsekaj pro la atento, ĉiufoje frapis sur la fingrojn de sia subalternulo.

La leterportisto, tuj kiam li ekvidis ilin, ekkriis:

– Rapide venu, oni murdas la impostkolektiston, rapidu, rapidu!

Ambaŭ viroj ĉesigis ilian laboron, kaj levis la kapojn, kapojn de mirigataj uloj, kiujn oni surprizas, kaj oni ĝenas.

Bonifaco, vidante ilin pli mirigataj ol urĝantaj, ripetis:

– Rapidu! Rapidu! La ŝtelistoj estas ankoraŭ en la domo, mi aŭdis la kriojn, ne havas tempon por perdi.

La brigadestro, surteren metante sian martelon, demandis:

– Kio donas al vi la konon pri tiu fakto?

La leterportisto reparolis:

– Mi iris por alporti la gazeton kaj du leterojn, kiam mi rimarkis, ke la pordo estis ŝlosita, kaj la impostkolektisto ne estis ankoraŭ ellitiĝinta. Mi faris doman rondiron por ekkompreni pri tio, kaj mi aŭdis, ke oni ĝemis, kvazaŭ se oni strangolus iun aŭ tranĉus la gorĝon al iu; tiam mi rapide foriris por serĉi vin. Ne plu havas tempon por perdi.

La brigadestro stariĝante reparolis:

– Kaj vi ne persone helpis al la viktimoj?

Konsternegita, la leterportisto respondis:

– Mi timis, ke mi ne estus en sufiĉa nombro.

Tiam la ĝendarmo, konvinkita, eldiris:

– Tuj mi vestiĝos, kaj mi sekvos vin.

Kaj li eniris en la ĝendarmejon, antaŭirante sian militiston, kiu kunportis la seĝon.

Senprokraste ili reaperis, kaj la tuta trio ekvoĵiris, kurante kadence, al la krimejo.

Alvenante apud la domo, singardeme ili malrapidigis ilian irmanieron, kaj la brigadestro elingigis sian revolveron, kaj ili penetris tute malrapide en la ĝardeneton, kaj alproksimiĝis al la murego. Neniu nova spuro montris, ke la krimuloj estis foririntaj. La pordo restis ŝlosita, kaj la fenestroj fermitaj.

– Ni tenas ilin, flustris la brigadestro.

La ulĉjo Bonifaco, tremetante pro la emocio, kondukis la brigadestron al la alia flanko, kaj montris al li ŝutron:

– Estas tie, li diris.

Kaj la brigadestro antaŭeniris tute sola, kaj almetis sian oreton kontraŭ tabulo de la ŝutro. Dum la du aliaj atendis, pretaj por interhelpi, kun la okuloj fiksataj sur li.

Li restis longe senmova, aŭskultante. Por pli bone alproksimigi sian kapon de la ŝutro el ligno, li demetis sian trikornan ĉapelon, kaj tenis ĝin per sia dekstra mano.

Kion li aŭdis? Lia senpasia vizaĝo nenion rivelis, sed subite lia lipharo ekstremis, liaj vangoj faldiĝis pro silenta rido, kaj denove transpaŝante la timianan borderon, li revenis al la du viroj, kiuj konsternite rigardis lin.

Poste li faris signon, por ke ili sekvu lin marŝante sur la pintoj de la piedoj; kaj revenante antaŭ la enirejo, li ordonis al Bonifaco, ke li enŝovu la gazeton kaj la leterojn sub la pordon.

La leterportisto, tute perpleksa, tamen discipline obeis.

– Kaj nun, ekiru ni, diris la brigadestro.

Sed, tuj kiam ili trapasis la barieron, li sin turnis al la leterportisto, kaj kun rikana mieno, mokema lipo kaj la okuloj brilaj pro la ĝojo:



– Kiel petolulo, vi estas!

La maljunulo demandis:

– Pri kio? Mi aŭdis, mi asertas vin, ke mi aŭdis.

Sed la ĝendarmo, ne sukcesante deteni sin de rido, ekridegis. Li ridis sufokante, havante la du manoj sur la ventro, kurbiĝante kun la okuloj plena da larmoj, kun malbelegaj grimacoj ĉirkaŭ la nazo. Kaj ambaŭ aliaj, frenezigitaj, rigardis al li.

Sed ĉar li ne plu povis paroli, nek ĉesigis la ridadon, nek komprenigi tion, kion li havis, li faris geston, petolan kaj popularan geston.

Ĉar oni daŭrigis ne kompreni lin, li plurfoje sinsekve ripetis la geston, montrante per kapsigno la ankoraŭ fermitan domon.

Kaj lia militisto, subite komprenante siavice, eksplodis per grandega gajeco.
 La maljunulo restis stulta inter la du viroj, kiuj ridegis.
 Fine la brigadestro kvietiĝis, kaj sendis sur la ventron de la maljunulo grandan frapon de viro, kiu amuziĝas, li ekkriis :
 – Ha! Ŝerculo, rimarkinda ŝerculo, mi memortenis la krimon al la ulĉjo Bonifaco!
 La leterportisto rondokule rigardis, kaj ripetis:
 – Mi asertas vin, ke mi aŭdis.
 La brigadestro denove ekridis. Lia ĝendarmo sidiĝis sur la herbon de la fosaĵo por ridegi plenkoforte.
 – Ha! Vi aŭdis. Kaj ĉu vian edzinon vi same murdas, nu, ega ŝerculo?
 – Mia edzino, ĉu?...
 Kaj li pripensis longe, poste li reparolis:
 – Mia edzino... Jes, ŝi blekas kiam mi batas ŝin... Jes, ŝi blekas, ŝi eĉ laŭte blekas! Ĉu do S-ro Ŝapujo batadis la sian?
 Tiam la brigadestro, freneza pro la ĝojo, turnis lin per la ŝultroj, kiel iun pupon, kaj subdiris ion al li, kiu restis stupora pro la miro.
 Poste la maljunulo, pensema; flustris:
 – Ne... tute ne tiamaniere... tute ne tiamaniere... tute ne tiamaniere... ŝi nenion diras, la mia... Mi neniam kredus... ĉu tio eblas?... oni ĵurus, ke oni martirigus ŝin...
 Kaj konfuza, konsterna, honta, li ree iris laŭ sia vojo tra la kampoj, dum la ĝendarmo kaj la brigadestro ankoraŭ ridadis kaj kriis al li de fore malprudajn kazernajn ŝercojn, rigardante malproksimiĝantan lian nigran kepon sur la kvietita maro de la rikoltoj.

Je la 24a de junio 1884

LA TIMO

La trajno plenvapore rapidis en la tenebroj.
 Mi troviĝis sola, vidalvide al maljuna sinjoro, kiu rigardis tra la pordo de la vagono. Tiu veturilo de la fervoja kompanio P.L.M. [*Parizo - Liono - Marsejlo*] forte odoris la fenolon, kaj sendube venis de Marsejlo.
 Tio okazis dum varmega nokto, sen luno kaj sen aero. Ni tute ne vidis stelojn, kaj la blovo de la rapida trajno ĵetis al ni ion, kiu estis varma, mola, lacegiga, nespirebla.
 Foririnte de Parizo jam de tri horoj, ni iris al la centro de Francio, vidante nenion de la trapasataj landoj.
 Subite estis kiel fantasta aperaĵo. Ĉirkaŭ granda fajro, en arbareto, du viroj estis starantaj.
 Ni vidis tion dum unu sekundo: estis, ŝajnas al ni, du mizeruloj vestitaj per vestaĉoj ruĝaj pro la luma brileto de la fajrejo. Iliaj barbaj vizaĝoj rigardis al ni, kaj ĉirkaŭ ili, kiel drama dekoro, estis verdaj arboj, helaj kaj brilaj. La trunkoj reflektis helan flamon tra la foliaro, kiu estis kvazaŭ malsekigita per la lumo.
 Poste, denove ĉio refariĝis nigra.
 Certe ja, tio estis tre stranga aperaĵo! Kion faris tiuj du ŝtelvaguloj en tiu arbaro? Kial tiu fajro en tiu sufoka nokto?
 Mia kunvojaĝanto eltiris sian poŝhorloĝon kaj diris al mi:
 – "Estas ekzakte noktomezo, Sinjoro, ni ĵus vidis strangan aferon."
 Mi konsentis pri tio, kaj ni ekis interbabili, serĉante tion, kio povis esti tiuj uloj: ĉu estis krimuloj kiuj bruligis pruvojn, ĉu sorĉistoj kiuj pretigis magian trinkaĵon? Ĉu oni

ekbruligas tian fajron, noktomeze, someromeze, en arbaro por kuiri la supon? Kion do ili faris? Ni ne sukcesis imagi ion verŝajnan.

Kaj mia najbaro ekparolis... Li estis maljuna viro, kies mi ne sukcesis determini la profesion. Ja certe, iu originalulo, tre klera, kaj kiu eble ŝajnis iom frenezeta.

Sed ĉu ni scias, kiuj estas la saĝuloj, kaj kiuj estas la frenezuloj, en tiu vivo en kiu la saĝeco devus ofte nomiĝi stulteco, kaj la frenezo nomiĝi genio?

Li diris:

– Mi estas kontenta, pro ke mi vidis tion. Dum kelkaj minutoj, mi travivis malaperintan sensacon!

Kiom antaŭe la tero devis esti sensemocia, kiam ĝi estis tiom mistera!

Samtempe, kiam ni levas la vualojn de la nekonataĵoj, ni senpopoligas la imagopovon de la homoj. Ĉu vi ne trovas, Sinjoro, ke la punkto iĝis malplena, kaj ĝia nigro iĝis vulgara post tio, kiam aperaĵoj ĉesis ekzisti?

Ni diras al ni: "Nek fantasto, nek strangaj kredoj, la tuta neklarigebleco estas klarigebla. La supernatureco malaltiĝas kiel la akvonivelo de lago, kiun kanalo elĉerpas, la scienco, iom post iom, regresis la limojn de la mirrakonto.

Nu, Sinjoro, mi apartenas al la malnova raso, tiu kiu ŝatas kredi. Mi apartenas al la malnova naiva raso, al kutimiĝinta ne kompreni, ne serĉi, ne scii, kiu akceptas la ĉirkaŭajn misterojn, kaj malkonsentas al la simpla kaj preciza vereco.

Jes, Sinjoro, nia fantazio konsumiĝis post tio, kiam oni ĉesis kredi al la mirakloj. Nun nia tero konsternas min, ĝi aperas al mi kiel mondo forlasita, malplena kaj nuda. La kredoj, kiuj igis ĝin poezia, estas foririntaj. Kiam nokte mi eliras, mi volus senti la timon, kiu devigas la maljunulinojn krucosigni sin, kiam ili laŭiras la murojn de la enterigejoj, kaj kiu devigas la lastajn superstiĉulojn forkuri de la strangaj marĉaj vaporoj kaj la kapricaj vaglumoj! Kiom mi volus kredi al tiu svaga kaj timiga aĵo, kiun oni imagis al si fluganta en la ombro.

Kiom antaŭe la mallumo de la vesperoj devis esti malhela, terura, dum ĝi estis plena de fabelaj kaj nekonataj estaĵoj, de malicaj ŝtelveguloj, kies ni ne povis diveni la formojn, kies antaŭtimo frostigis la koron, kies okulta potenco transpasis la limojn de nia penso, kaj kies atingo estis neevitebla?

Kun la supernatureco, la vera timo malaperis de la tero, ĉar ni vere timas la aferojn, kiujn ni ne komprenas. La videblaj danĝeroj povas emocii, malserenigi, timigi! Kio estas tio kompare kun la konvulsio donita al la animo per la penso, kiam ni tuj renkontos kun vaga fantomo, kiam ni tuj suferos la brakumadon de mortinto, kiam ni tuj vidos alkuri unu el tiuj timigaj bestoj, kiujn inventis la teruro de la homoj? La tenebroj ŝajnas al mi helaj, ekde kiam ili ne plu estas hantitaj.

Kaj la pruvo pri tio, estas ke se subite ni troviĝus solaj en tiu arbareto, ni estus obsedataj de la bildo de la du apartaj estaĵoj, kiuj ĵus aperis al ni en la lumeto de fajro, pli multe ol de la antaŭtimo de ajna kaj reala danĝero.

Li rediris: "Ni vere timas tiun, kiun ni ne komprenas."

Kaj subite memoraĵo venis al mi, la memoraĵo pri rakonto, kiun diris al ni Turĝenev, iun dimanĉon, ĉe Gustave Flaubert [*Gustavo Flober*].

Ĉu li skribis ĝin ie, mi tute ne scias.

Neniu pli ol la granda rusa romanverkisto povis vekti en la animo tiun tremeton de la vualita nekonataĵo, kaj en la duonlumo de stranga fabelo montri tutan mondon de maltrankviligaj, necertaj kaj minacaj aĵoj.

Kun li, ni bone sentas la konfuzan timon de la Nevideblaĵo, la timon de la nekonataĵo, kiu estas malantaŭ la pordo, malantaŭ la videbla vivo. Kun li, ni estas bruske transpasitaj de dubaj lumoj, kiuj sufiĉe lumigas por nur pliigi nian angoron.

Iafoje aŭskultante lin ni komprenas la sencon de strangaj koincidoj kaj neatenditaj cirkonstancoj, kiuj ŝajnas hazardaj, sed kiuj estus gvidataj per ia kaŝa kaj insidema volo. Li

helpas nin trovi iun nevideblan fadenon, kiu misteregvidas nin tra la vivo, kiel tra malhela sonĝo, kies senco senĉese eskapas al ni.

Li tute ne eniras aŭdace en la supernaturecon, kiel *Edgar Poe* aŭ *Hoffmann*, li rakontas simplajn fabelojn, en kiuj miksiĝas nur io iom svaga kaj iom emocia.

Tiun tagon, li ankaŭ diris al ni: "Ni vere timas tiun, kiun ni tute ne komprenas."

Li sidiĝis, aŭ prefere li sternaĉis sin en granda fotelo, kun la brakoj pendantaj, la kruroj etenditaj kaj malfirmaj, la kapo tute blanka, dronanta en tiu granda fluo de barbo kaj arĝentaj haroj, kiuj aspektigis lin kvazaŭ la Eternulo aŭ Rivero de Ovidio.

Li malrapide parolis, kun iu pigreco, kiu donis ĉarmon al la frazoj, kaj iun heziton de la prononco iom peza, kiu substrekis la kolorriĉan ĝustecon de la vortoj. Liaj palaj okuloj, malfermegaj, esprimis kiel infanaj okuloj, ĉiujn emociojn de lia penso.

Li rakontis tion al ni:

Kiam li estis ankoraŭ juna viro, li ĉasis en arbaro de Rusio. Marŝadinte dum la tuta tago, vespere li alvenis sur la bordon de kvieta rivero.

Ĝi fluis sub la arboj, tra la arboj, plena je flosantaj herboj, profunda, malvarma kaj klara.

Postulema bezono ekkaptis la ĉaŝiston, ke li sin ĵetu en tiun travideblan akvon. Li senvestiĝis kaj impetis en la fluon. Li estis tre granda kaj tre forta knabo, vigla, kaj aŭdaca naĝanto.

Li lasis sin milde flosi, kun la animo trankvila, tuŝetata de la herboj kaj la radikoj, feliĉa senti kontraŭ sia karno la leĝeran glitadon de la lianoj.

Subite mano sin metis sur lian ŝultron.

Li sin turnis per skuo, kaj ekvidis timigan estaĵon, kiu avide rigardis al li.

Tio similis virinon aŭ simiion. Ĝi havis grandegan, faldatan, grimacantan vizaĝon, kiu ridis. Du nenomeblaj aĵoj, sendube du mamoj, flosis antaŭ ĝi, kaj supermezuraj haroj, miksitaj, brunbruligitaj de la suno, ĉirkaŭis ĝian vizaĝon, kaj flosis sur ĝia dorso.

Turgenev sentis sin trapasata de la hida timo, la glacia timo de la supernaturaj okazaĵoj.

Ne pripensante, ne prikalkulante, ne komprenante, li freneze ekenaĝis al la bordo. Sed la monstro naĝis ankoraŭ pli rapide ol li, kaj tuŝis lian kolon, dorson kaj krurojn kun etaj ĝojaj rikanoj. La junulo, freneza pro teruro, fine trafis la riverbordon, kaj plenrapide impetis tra la arbaro, ne eĉ pensante repreni siajn vestojn kaj sian pafilon.

La timiga estaĵo sekvis lin, kurante tiel rapide kiel li, kaj grumblante senĉese.

La fuĝanto, ne plu havante fortojn, kaj kripla pro teruro, estis falonta, kiam infano, kiu gardis kaprinojn alkuris, armita per vipo, li ekfrapis la mallogan homan beston, kiu forkuris eligante kriojn pro la doloro. Kaj Turgenev vidis, ke ĝi malaperis en la foliaron, simila al femalo de gorilo.

Temis pri frenezulino, kiu vivis jam de pli tridek jaroj en tiu arbaro, dank'al la bonkoreco de la ŝafistoj, kaj kiu pasigis la duonon de la tagoj naĝante en la rivero.

La fama rusa verkisto aldiris: "Mi neniam tiom timis dum mia vivo, ĉar mi ne komprenis tion, kio povis esti tiu monstro."

Mia akompananto, al kiu mi rakontis tiun aventuron, reparolis:

– Jes, ni timas nur la eventojn, kiujn ni ne komprenas. Ni vere sentas la hororan konvulsion de la animo, kiu nomiĝas teruro, nur kiam miksiĝas al la timo iom de la superstiĉa teruro de la pasintaj jarcentoj. Persone, mi spertis tiun teruron kun ĝia tuta hororo, kaj tio por evento tiom simpla, tiom stulta, ke mi apenaŭ aŭdacas rakonti ĝin.

Mi piede vojaĝis tra Bretonio, tute sola. Mi jam travizitis Finistère [*Terfinon*], la dezertajn erikejojn, la nudajn terojn kie kreskas nur la uleksoj, apud grandaj sakralaj ŝtonoj, fantomitaj ŝtonoj. Antaŭtage mi vizitis la sinistran pinton de Raz [*Ra*], tiun finon de la malnova mondo, kie eterne interbatalas la ondoj de Atlantiko kaj la Manika Markolo. Mi

havis la spiriton plenan de legendoj, de rakontitaj aŭ legitaj fabeloj pri tiu tero de kredoj kaj superstiĉoj.

Kaj mi nokte iris de Penmarch [*Penmars'*] al Pont-l'Abbé [*Ponto-la-Abato*]. Ĉu vi konas Penmarch? Plata marbordo, tute plata, tute malalta, pli malalta ol la maro, ŝajnas. Ĉie oni vidas tiun minacan kaj grizan maron, plenan de ŝaŭmaj rifoĵ kvazaŭ furiozaj bestoj.

Mi vespermanĝis en kafejo de fiŝkaptistoj, kaj nun mi marŝis sur la rekta vojo, inter du erikejoj. La nokto estis tre nigra.

De tempo al tempo, druida ŝtono, simila al staranta fantomo, ŝajnis rigardi min pasi, kaj iom post iom malpreciza timo eniris en min, timo pri kio? Mi tute ne sciis. Estas vesperoj, kiam ŝajnas, ke spiritoj ĉirkaŭas, kaj animo tremis sen kialo, kaj koro batadas pli forte pro nekomprenbla timo de iu neklarigebleco, kaj mi bedaŭras pri malapero de tiu.

Kiom longa tiu vojo ŝajnis al mi, longa kaj senfine vaka.

Neniu bruo estis krom la ronkado de la ondoj, tie for malantaŭ mi, kaj iafoje tiu monotona kaj minaca bruo ŝajnis tute proksime, tiom proksime, ke mi kredis ilin tuj post mi, kurante tra la ebenaĵo kun sia ŝaŭmofronto, kaj mi emis forkuri, rapidege forfuĝi antaŭ ili.

La vento, ternivela vento, blovante per skualoj, siblis en la uleksoj ĉirkaŭ mi. Kaj, malgraŭ ke mi rapidegis, miaj brakoj kaj miaj kruroj suferis pro malvarmo, aĉa malvarmo pro timo.

Ho! Kiom mi volintus renkontiĝi kun iu!

La nokto estis tiom nigra, ke nun mi apenaŭ distingis la vojon.

Kaj subite mi aŭdis antaŭ mi, tre malproksime, radobruon. Mi pensis: "Nu! iu veturilo!" Poste nenion mi plu aŭdis.

Post unu minuto, mi distingeble perceptis la saman bruon, pli proksime.

Tamen mi vidis neniun lumon, sed mi diris al mi: "Ili ne havas lanternon. Neniu mirinde en tiu lando de sovaĝulo."

Denove la bruo ĉesis kaj rekomencis. Ĝi estis tro akuta, por ke tio estis ĉareto, kaj cetere mi tute ne aŭdis la bruon de trotanta ĉevalo, tio mirigis min, ĉar la nokto estis kvieta.

Mi provis kompreni: "Kio estas tio?"

Tio alproksimiĝis rapide, tre rapide! Sed mi aŭdis nur bruon de rado – neniun batadon de hufoferoj aŭ piedoj, – nenion. Kio estas tio?

Tio estis proksime, tute proksime; mi ĵetis min en fosaĵon per movo de instinkta timo, kaj mi vidis preterpasi apud mi ĉarumon, kiu kuradis... tute sola, neniun puŝis ĝin... Jes... ĉarumon... tute sola...

Mia koro eksaltis tiel violente, ke mi sinkis sur la herbon, kaj mi aŭskultis la radobruon, kiu forigis, kiu iris al la maro. Kaj mi plu kuraĝis nek stariĝi, nek marŝi, nek moviĝi. Se ĝi revenus, se ĝi pelus min, mi mortus pro teruro.

Mi retrankviliĝis nur post longa tempo, post tre longa tempo. Kaj mi daŭrigis mian iradon kun tia timo en la animo, ke la plej malgranda bruo senspirigis min.

Kiom tio estas stulta, ĉu? Sed kia timo! Meditante pri tio, pli malfrue mi komprenis, ke sendube iu infano kondukis tiun ĉarumon, nudpiede, dum mi serĉis la kapon de viro al la kutima alteco!

Ĉu vi komprenas tion? Kiam mense ni jam havas tremeton pro supernatureco... ĉarumo kiu kuras... tute sola... Kia timo!

Li silentis dum momenteto, kaj reparolis:

– Ej! Sinjoro, nun ni vidas kuriozan kaj teruran spektaklon: tiun invadon de ĥolero!

Vi odoras la fenolon, per kiu oni toksis tiujn vagonojn. Tio signifas, ke ĥolero estas ie, tie.

Necesas vidi Tulono-n nuntempe. Nu, ni ja sentas, ke ĝi estas tie, Ĝi. Kaj ne estas la timo pri malsano, kiu frenezigas tiujn loĝantojn. La ĥolero estas alia afero, estas la

Nevideblaĵo, malnovtempa plago, plago de la pasintaj tempoj, iu speco de misfara Spirito, kiu revenas kaj mirigas tiom, kiom ĝi timigas nin, ĉar ĝi apartenas, ŝajnas, al la antikva tempo.

La kuracistoj ridigas min kun sia mikrobo. Ne estas insekto, kiu teruras la homojn tiagrade, ke ili saltas tra la fenestro. Estas la ĥolero, la terura kaj neesprimebla estaĵo venanta de la fundo de Oriento.

Trapasu Tulono-n, oni dancas sur la stratoj.

Kial danci dum tiuj tagoj de morto? En la kamparo, ĉirkaŭ la urbo, oni fajrigas piroteknikaĵon; oni ekbruligas ĝojfajron, orkestroj ludas gajajn ariojn sur ĉiuj publikaj promenejoj.

Ĉar Ĝi estas tie, ĉar oni spitas ĝin, ne la Mikrobon, sed la Ĥoleron, kaj oni volas brave fieri antaŭ ĝi, kiel antaŭ kaŝita malamiko, kiu gvatas vin. Estas por ĝi, ke oni dancas, oni ridas, oni krias, oni ekbruligas tiujn fajrojn, oni ludas tiujn valsojn, ĉio estas por Ĝi, la Spirito kiu mortigas, kaj kiun ĉie oni sentas ĉeestantan, nevideblan, minacatan, kiel unu el tiuj malnovaj malbonaj genioj, kiujn ekzorcis la barbaraj pastroj...

La 25an de julio 1884

LA MARKIZO DE FUMEROL

Roĝero de Tourneville [*Turn'vil'*], meze de la rondo de siaj amikoj, parolis, rajde sidanta sur seĝo, tenante enmane cigaron, kaj de tempo al tempo, li enspiris kaj elspiris nubeton da fumo.

Ni ĉetable sidis, kiam oni alportis leteron. Mia paĉjo malfermis ĝin. Vi ja konas mian paĉjon, kiu kredas, ke li provizore anstataŭas la Reĝon en Francio. Persone mi nomas lin Donkiĥoto, ĉar li bataladis dum dek du jaroj kontraŭ la ventmuelilo de la Respubliko, kvankam li mem ne bone sciis, ĉu li bataladas por la Burbonoj aŭ por la Domo de Orléans [*Orleano*]. Nun li tenas la standardon nur en la nomo de la Domo de Orléans, ĉar ĝi estas sola. Ĉiuokaze paĉjo sin taksas, kiel se li estus la ĉefa nobelo de Francio, la plej konata, la plej influa, la estro de la partio, kaj ĉar li estas neeksigebla senatano, li konsideras la tronojn de la ĉirkaŭaj Reĝoj kiel malmulte sekurajn.

Pri panjo, ŝi estas la animo de paĉjo, ŝi estas la animo de la reĝeco kaj la religio, la ĉefkunlaboranto de Dio sur tero, kaj la plago de la liberpensuloj.

Do oni alportis leteron dum ni ĉetable sidis. Paĉjo malfermis ĝin, legis ĝin, poste li rigardis panjon kaj diris al ŝi: "Via frato estas ĉe la mortmomento." Panjo paliĝis. Hejme oni preskaŭ neniam parolis pri mia onklo. Persone, mi tute ne konis lin. Mi nur sciis per la publika onidiro, ke li vivis kaj ankoraŭ vivas senbride. Elspezinte sian riĉaĵon kun nekalkulebla nombro de virinoj, nun li konservis nur du amorantinojn, kun kiuj li vivis en malgranda apartamento, en la strato de la Martiroj.

Ekspajro de Francio, ekskolonelo de kavalerio, oni diris, ke li timis nek Dion, nek Diablon. Dubante do pri la estonta vivo, li trouzisper ĉiuj manieroj la nuntempan vivon, kaj li fariĝis la akra vundo de la koro de panjo.

Ŝi diris: "Donu al mi tiun leteron, Paŭlo."

Kiam ŝi finis la legadon de la letero, miavice mi petis ĝin. Jen:

"Sinjoro la grafo, mi kredas devi sciigi al vi, ke via bofrato la markizo de Fumerol estas mortanta. Eble vi volus fari disponojn, kaj ne forgesu, ke mi avertis vin.

"Via servistino,

"Melania."

Paĉjo murmuris: "Necesas pripensi. En mia situacio, mi devas prizorgi koncerne la lastajn momentojn de via frato."

Panjo reparolis: "Mi tuj venigos la pastron Papriko, kaj petos al li konsilon. Poste mi iros viziti mian fraton kun la pastro kaj Roĝero. Paŭlo, vi restu ĉi tie. Vi ne devas kompromiti vin. Edzino povas fari kaj devas fari tiujn aferojn. Sed koncerne politikan homon en via situacio, estas alia afero. Kontraŭulo ĝuus favorajn cirkonstancojn por uzi kontraŭ vi la plej laŭdindan el viaj agadoj.

– Vi pravas, diris mia paĉjo. Faru laŭ via inspiro, mia kara amikino."

Kvaronhoron pli poste, la pastro Papriko eniris en la salonon, kaj la situacio estis prezentita, analizita, diskutita sub ĉiuj siaj flankoj.

Se la markizo de Fumerol, unu el la grandaj nomoj de Francio, mortiĝus sen la sakramentoj, ja certe la frapo estus terura por la nobelaro ĝenerale, kaj aparte por la grafo de Tourneville. La liberpensuloj triumfus. La gazetaĉoj prikantus venkon dum ses monatoj; oni ĵetus koton sur la nomon de mia patrino, kaj en la artikolaĉoj de la socialistaj gazetoj, la nomo de mia patro estus makulata. Estis neeble, ke tia afero okazos.

Do kampanjo estis tuj decidita, kiu estos kondukata de la pastro Papriko, malgranda, grasa kaj pura ekleziulo, iom parfumita, vera vikario de granda kirko en riĉa kaj nobla kvartalo.

Landaŭo estis jungita, kaj ĉiuj tri, panjo, la pastro kaj mi, forveturis por sanktolei mian onklon.

Ni interkonsentis, ke unue ni vidos S-inon Melania, la skribintinon de la letero, kiu devis esti la domgardistino aŭ la servistino de mia onklo.

Kiel antaŭ esploranto mi unua malsupreniĝis el la landaŭo antaŭ domego je sep etaĝoj, kaj eniris en malluman koridoron, kie mi multe penadis por trovi la obskuran loĝejaĉon de la pordisto. Tiu viro, malfidema, arogante rigardis al mi.

Mi demandis: "Bonvolu diri, kie loĝas Sinjorino Melania?"

– Mi ne konas!

– Sed, mi ricevis leteron de ŝi.

– Tio eblas, sed mi ne konas. Ĉu ŝi estas vivtenatino?

– Ne, verŝajne iu servistino. Ŝi skribis al mi por posteno.

– Servistino!.. Servistino, ĉu?... Eble tiu al la markizo. Iru vidi, ĉe la kvina, maldekstre".

Ĉar mi ne petis pri vivtenatino, li fariĝis pli afabla, kaj li venis ĝis la koridoro. Li estis granda maldikulo, kun blankaj vangharoj, aspektis kiel pedelo kaj majeste agis.

Mi kurante grimpis longan gluecan helikan ŝtuparon, al kiu mi ne aŭdacis tuŝi la manrelon, kaj mi frapetis tri diskretajn batojn kontraŭ la maldekstra pordo je la kvina etaĝo.

Tuj la pordo malfermiĝis, kaj malpura, dikega virino troviĝis antaŭ mi, barante la enirejon per siaj etenditaj brakoj, kiuj apogis sin ĉe la du fostoj de la pordo.

Ŝi grumblis: "Kion vi volas?"

– Ĉu vi estas sinjorino Melania?

– Jes.

– Mi estas la vicgrafo de Tourneville.

– Ha bone! Eniru.

– Estas ke... panjo estas malsupre kun pastro.

– Ha bone... Iru serĉi ilin. Sed gardu vin kontraŭ la pordisto."

Mi malsupreniris kaj resupreniris kun panjo kaj la pastro. Ŝajnis al mi, ke mi aŭdis aliajn paŝojn malantaŭ ni.

Tuj kiam ni troviĝis en la kuirejo, Melania proponis al ni seĝojn, kaj ĉiuj kvar sidiĝis por interkonsiliĝi.

"Ĉu li estas en tre malbona stato? demandis panjo.

– Ha jes, sinjorino, li ne plu vivos longtempe.

– Ĉu li ŝajnas preta akcepti la viziton de pastro?

– Ho!... Mi ne kredas.

– Ĉu mi povas vidi lin?

– Sed... jes... sinjorino... sed... sed... tiuj fraŭlinoj estas apud li.

– Kiu fraŭlinoj?

– Sed... sed... siaj bonaj amikinoj do.

– Ha!"

Panjo fariĝis tute ruĝa. La pastro Papriko malfermis la okulojn. Tio komencis amuzi min, kaj mi diris:

"Se mi enirus la unua, mi ja vidus kiel li akceptus min, kaj mi povus eble prepari lian koron."

Panjo, kiu ne vidis maliceton en la afero, respondis: "Jes, mia infano."

Sed ie pordo malfermiĝis, kaj voĉo, virina voĉo, kriis:

"Melania!"

La dika servistino impetis, kaj respondis:

"Kio necesas al vi, fraŭlino Klara?"

– La omleton, ja rapide.

– Post unu minuto, fraŭlino."

Kaj revenante al ni, ŝi klarigis tiun alvokon:

"Temas pri omleto kun fromaĝo, kiun ili mendis al mi kiel manĝeton, por ke mi servu ĝin al ili je la dua."

Kaj ŝi senprokraste rompis la ovojn en salatujon, kaj arde ekbatmiksitis ilin.

Tiam, mi eliris sur la ŝtuparon, kaj sonorigis por anonci mian oficialan alvenon.

Melania malfermis la pordon, sidigis min en antaŭĉambron, kaj iris anonci mian ĉeeston al mia onklo, poste ŝi revenis peti min, ke mi eniru.

La pastro sin kaŝis malantaŭ la pordo por aperi je la unua signo.

Ja certe, vidante mian onklon mi estis surpriza. Li estis tre bela, tre solena, tre ŝika, tiu maljuna diboĉulo.

Sidanta, preskaŭ kuŝanta en granda brakseĝo, kun la gamboj envolvitaj per litkovrilo, la manoj, longaj palaj manoj, pendantaj sur la brakoj de la sidilo, li atendis la morton kun biblia digneco. Lia blanka barbo falis sur sia brusto, kaj liaj haroj, ankaŭ tute blankaj, kunigis ĝin sur la vangoj.

Starantaj, malantaŭ lia brakseĝo, kvazaŭ por defendi lin kontraŭ mi, du junaj virinoj, du grasaj malgrandaj virinoj, rigardis al mi kun aŭdacaj okuloj de ĉiesulinoj. Vestitaj per jupo kaj negliĝo, la brakoj nudaj, kun nigraj haroj falantaj senorde sur la nuko, piedvestitaj per orientaj trivitaj pantofloj kun oraj brodaĵoj, kiuj montris la maleolojn kaj la silkajn ŝtrumpojn, ili aspektis, apud tiu mortiĝanto, kiel malmoralaj figuroj de simbola pentraĵo. Inter la brakseĝo kaj la lito, malgranda tablo kovrita per tablotuko, du teleroj, du glasoj, du forkoj kaj du tranĉiloj, atendis la omleton kun fromaĝo menditan post momento al Melania.

Mia onklo per malforta, spirmanka, sed neta voĉo diris:

"Saluton, mia infano. Jam malfruas por veni min vidi. Nia konatiĝo ne estos longe."

Mi balbutis: "Mia onklo, pri tio mi ne kulpas..."

Li respondis: "Jes, tion mi scias. Pri tio, via patro kaj via patrino pli kulpas ol vi... Kiel ili fartas?"



– Ne malbone, mi vin dankas. Kiam ili eksciis, ke vi estis malsana, ili sendis min informiĝi pri via sano.

– Ha! Kial ili ne venis mem?

Mi rigardis la du knabinoj, kaj milde diris: "Ili ne kulpas, pro ke ili ne povis veni, mia onklo. Sed estus malfacile al mia patro, kaj neebla al mia patrino, ke ili eniru tien..."

La maljunulo nenion respondis, sed levis sian manon al la mia. Mi ekkaptis tiun palan kaj malvarman manon, kaj kunpremis ĝin.

La pordo malfermiĝis. Melania eniris kun la omleto, kaj metis ĝin sur la tablon. Tuj, la du virinoj sidiĝis antaŭ siaj teleroj, kaj ekmanĝis ne deturnante la rigardon de mi.

Mi diris: "Mia onklo, tio tre ĝojigus mian patrinon, se ŝi povus vin kisi."

Li murmuris: "Mi ankaŭ... mi volus..." kaj li silentis. Nenion mi trovis plu por diri, kaj oni plu aŭdis nur la bruon de la forkoj sur la porcelano, kaj tiun malprecizan movon de la buŝoj, kiuj maĉas.

Tiam la pastro, kiu aŭskultis malantaŭ la pordo, komprenante nian embarason, kaj kredante la partion gajnitan, juĝis favora la momenton por intermeti sin, kaj li montriĝis.

Mia onklo estis tiom konsternata pro tiu apero, ke unue li restis senmova, poste li malfermis la buŝon, kvazaŭ li volus engluti la pastron; poste, per forta, profunda, furioza voĉo, li kriis:

"Kion vi venas fari tie ĉi?"

La pastro, kutimiĝinta al la malfacilaj situacioj, daŭrigis antaŭeniri, murmurante:

"Mi venas je nomo via fratino, sinjoro la markizo, estas ŝi, kiu sendas min... Ŝi estus tiom feliĉa, sinjoro la markizo..."

Sed la markizo ne aŭskultis lin. Levante manon li montris la pordon per tragika kaj superba gesto, kaj incitegata, anhelanta, li diris:

"For de ĉi tie... for de ĉi tie... ŝtelistoj de animoj... For de ĉi tie, profanistoj de konsciencoj... For de ĉi tie, dirkospertuloj de pordoj de la mortiĝantoj!" Kaj la pastro retroiris, kaj ankaŭ mi, mi retroiris al la pordo, forfuĝante kun la klerikaro. Vengitaj, la du malgrandaj virinoj leviĝis, forlasante sian omleton duonmanĝitan, kaj ili lokiĝis je ĉiu flanko de la brakseĝo de mia onklo, metante siajn manojn sur liaj brakoj por kvietigi lin, por protekti lin kontraŭ la krimaj projektoj de la Familio kaj la Religio.

La pastro kaj mi rekuniĝis kun panjo en la kuirejo. Kaj denove Melania proponis al ni seĝojn.

"Mi ja sciis, ke la afero ne iros tute glate, ŝi diris. Necesas trovi ion novan, alie li eskapos al ni."

Kaj ni rekomencis interkonsiliĝi. Panjo havis opinion; la pastro defendis alian. Kaj mi malsame opiniis.

Ni mallaŭte diskutis jam eble dum duonhoro, kiam granda bruo de mebloj movataj, kaj krioj eligataj de mia onklo, pli impetaj kaj ankoraŭ pli teruraj ol la unuaj, starigis nin ĉiujn kvar.

Ni aŭdis tra la pordoj kaj la septoj: "Eliru... eliru... kruduloj... fiuloj... eksteren kanajloj... eksteren... eksteren..."

Melania sin pelis, kaj tuj revenis por helpo peti de mi. Mi alkuris. Vidalvide al mia onklo, leviĝante pro la kolero, preskaŭ staranta, du viroj, unu malantaŭ la alia, ŝajnis atendi, ke li mortiĝu pro furiozo.

Pro lia longa ridinda redingoto, liaj longaj anglaj ŝuoj, lia aspekto de instruisto sen posteno, pro lia rekta kolo kaj lia blanka kravato, liaj plataj haroj, lia humila mieno de falsa pastro de bastarda religio, mi tuj rekonis la unuan, kiel protestantan pastoron.

La dua estis la domgardisto de la domo, kiu apartenis al la protestanta kulto, kaj post sekvis nin, vidis nian malvenkon, estis kurinta serĉi sian propran pastron, esperante plibonan sorton.

Mia onklo aspektis freneze furioza! Se la vidado de la katolika pastro, la pastro de siaj prapatroj, incitis la markizon de Fumerol, kiu fariĝis liberpensulo, la aspekto de la pastoro de sia pordisto rabie kolerigis lin.

Mi ekkaptis ambaŭ viroj per la brakoj, kaj forĵetis ilin eksteren, tiom bruske, ke ili violente kisis sin reciproke dufoje sinsekve, dum ili trapasis la du pordojn, kiuj kondukis al la ŝtuparo.

Poste miavice mi eliris, kaj reeniris en la kuirejon, nian stabejon por peti konsilon de mia panjo kaj la pastro.

Sed Melania, konsternegata, revenis ĝemante: "Li mortas... li mortas... venu rapide... li mortas..."

Mia patrino impetis. Mia onklo estis falinta, laŭ sia tuta longeco, surplanken, kaj li ne plu moviĝis. Mi ja estis certa, ke li estis mortinta.

Ĉe tiu momento, panjo estis superba. Ŝi rekte marŝis al la du ĉiesulinoj genuiĝantaj apud la korpo, kaj kiuj penis por levi ĝin. Kaj montrante al ili la pordon, kun nerezistebla aŭtoritateco, digneco, majesteco, ŝi prononcis:

"Nun estas vi, kiuj devas eliri."

Kaj ili eliris, ne protestante, ne dirante vorton. Necesas aldiri, ke mi preparis min por elĵeti ilin kun la sama vikleco, kun kiu mi elpelis la pastoron kaj la dompordiston.

Tiam la pastro Papriko sanktoleis mian onklon per ĉiuj uzataj preĝoj, kaj la pekojn pardonis al li.

Panjo plorĝemis, kliniĝanta apud sia frato.

Subite, ŝi ekkriis:

"Li rekonis min. Li premis al mi la manon. Mi estas certa, ke li rekonis min!!!!... kaj li dankis min! Ho, Dio mia! Kia ĝojo!"

Kompatinda panjo! Se ŝi komprenis, aŭ divenis, al kiu kaj al kio tiu danko estis destinata!

Oni kuŝigis la onklon sur sian liton. Nun li estis ja mortinta.

"Sinjorino, diris Melania, ni ne havas littukojn por vindi lin. La tuta tolaĵaro apartenas al tiuj fraŭlinoj."

Pri mi, mi rigardis la omleton, kiun ili ne finis manĝi, kaj samtempe mi emis plori kaj ridi. Iafoje, ekzistas strangaj momentoj kaj strangaj sentoj, dum la vivo!

Nu, ni faris al mia onklo grandiozan entombigan ceremonion, kun kvin paroladoj ĉe la tombo. La senatano barono de Croisselles [*kraŭsel*] pruvis, per admirindaj terminoj, ke Dio ĉiam revenas venkanta en la purrasajn animojn, devoĵigitajn dum momento. Ĉiuj membroj de la rojalista kaj katolika partio sekvis la funebran procesion kun entuziasmo de triumfantoj, parolante pri tiu bela morto, post tiu vivado iom tumulta.

La vicgrafo Roĝero silentis. Ĉirkaŭ li oni ridis. Iu diris: "Ba! Tio estas la historio de ĉiuj lastmomentaj konvertiĝoj."

Je la 5a de oktobro 1886

MORENO, TIU PORKULO!

Al S-ro Oudinot [*Udino*]

1a ĉapitro

– Jen, mia amiko, mi diris al Labarbo, vi ankoraŭ ĵus prononcis tiujn tri vortojn: «Moreno, tiu porkulo». Kial, diable, ĉu mi neniam aŭdis pri Moreno, sen tio ke oni insulte nomu lin «porkulo»?

Labarbo, kiu nun estas deputito, rigardis al mi kun okuloj de arbara strigo:

– Kiel, vi ne konis la historion de Moreno, kaj vi loĝis en La Rochelle [*La Roŝel*], ĉu?

Mi konfesis, ke mi ne konas la historion de Moreno. Tiam Labarbo frotis al si la manojn, kaj komencis sian rakonton.

– Vi konis S-ron Moreno, ĉu ne, kaj vi memoris pri lia granda mercerejo sur la kajo de La Rochelle, ĉu?

– Jes, perfekte.

– Nu, sciu ke en 1862 aŭ -63 Moreno iris travivi dum du semajnoj en Parizo, por sia plezuro, aŭ siaj plezuroj, sed je preteksto de renovigo de siajn provizojn. Vi ja scias tion, kio estas por provinca komercisto, du semajnoj en Parizo. Tio enmetas la fajron en la sangon. Ĉiuvespere estas spektakloj, virinaj tuŝetoj, kontinua mensa ekscito. Oni freneziĝas. Oni vidas plu nur dancistinojn en ilia dancvestaĵo, dekoltitajn aktorinojn, rondajn gambojn, dezirovekajn ŝultrojn, ĉio ĉi preskaŭ atingebla, sen tio ke oni aŭdacu aŭ povu tuŝi tion. Apenaŭ se oni gustumas, unufoje aŭ du-, kelkajn malplivalorajn karnojn. Kaj oni revenas hejmen kun la koro ankoraŭ tute skuata, la animo gajekscitata, kaj iu speco de juko de kisoj, kiu tiklas al vi la lipojn.

Moreno troviĝis en tiu stato, kiam li aĉetis sian bileton por reveturi al La Rochelle, per la vespera eksprestrajno je la oka kaj kvardek, kaj li promenis, sopirema kaj konfuzata, tra la granda komuna antaŭĉambro de la fervojo de Orléans [*Orleano*], kiam li abrupte haltis antaŭ juna virino, kiu kisis maljunan virinon. Ŝia vualetto estis levita, kaj Moreno, feliĉega, murmuris: «Ha! La bela persono!»

Kiam ŝi finis siajn adiaŭojn al la maljunulino, ŝi eniris en la atendejon, kaj Moreno sekvis ŝin; poste ŝi iris sur la kajon, kaj Moreno ankoraŭ sekvis ŝin; poste ŝi eniris en malplenan kupeon, kaj ĉiam Moreno sekvis ŝin.

Estis malmultaj da vojaĝantoj en la eksprestrajno. La lokomotivo fajfis; la trajno foriris. Ili estis solaj.

Moreno avide rigardis al ŝi. Ŝi ŝajnis havi inter dek naŭ kaj dudek jarojn; ŝi estis blonda, granda, kaj aspektis maltimema. Ŝi volvis sin en vojaĝa kovrilo, kaj kuŝiĝis sur la banketoj por dormi.

Moreno demandis al si: «Kiu ŝi estas?» Kaj mil supozoj, mil projektoj trapasis lian spiriton. Li diris al si: «Oni rakontas tiom pri fervojaj aventuroj. Eble jen unu kiu sin prezentas al mi. Kiu scias? Bona fortuno okazas tiel rapide. Eble sufiĉus al mi, ke mi estu aŭdaca. Danton ja diris: «Estu aŭdaca, aŭdaca kaj ĉiam aŭdaca!» Se tion ne diris Danton, tiam tion diris Mirabeau. Fine, ne gravas. Jes, sed aŭdaco mankas al mi, jen la obstaklo. Ho! Se oni scius, se oni povus legi en la animoj! Mi vetas, ke ĉiutage, dubante pri nenio, oni maltrafas belegajn okazojn. Tamen sufiĉus al ŝi nur gesto, por sciigi al mi, ke ŝi pli bone ne petas...»

Tiam, li supozis kombinadojn, kiuj kondukus lin al la triumfo. Li imagis kavalirecan ekkonatiĝon; etajn komplezojn, kiujn li farus al ŝi; vigan, galantan konversacion; kiu finiĝos per deklaro, kiu finiĝos per... per tio kion vi pensas.

Tamen la nokto fluis, kaj la bela infano daŭre dormis, dum Moreno meditis pri la fino de sia mensa aventuro. Tagiĝis, kaj baldaŭ la suno elĵetis sian unan radion, longan helan radion venantan de la horizonto, sur la mildan vizaĝon de la dormantino.

Ŝi vekigis, sidiĝis, rigardis la kamparon, rigardis al Moreno kaj ridetis. Ŝi ridetis kiel feliĉa virino, kun gaja kaj alloga mieno. Moreno ektemis. Nedubeble, tiu rideto estis por li, ja temis pri diskreta invito, la dezirata signalo, kiun li atendis. Tiu rideto volis diri: «Kiom vi estas stulta, kiom vi estas naivega, kiom vi estas facile trompebla, restadinte tie, kiel paliso, sur via sidilo de antaŭ hieraŭ vespere».

«Vidu, rigardu al mi, ĉu mi ne estas ĉarma? Kaj vi restadis tiel, dum tuta nokto, duopintime kun bela virino, aŭdacante nenion, granda idioto».

Rigardante al li, ŝi daŭre ridetis; ŝi eĉ komencis ridi; kaj li perdis la saĝon, serĉis procirkonstancajn vortojn, komplimenton, fine ion por diri, ion ajn. Sed li trovis nenion, nenion. Tiam, ekkaptita de aŭdaco de malkuraĝulo, li pensis: «Okazu, kio okazos! Mi riskas ĉion!»; kaj neatendite, «senaverte», li antaŭeniris kun la manoj etenditaj, la lipoj voremaj, kaj ekkaptante ŝin plenbrake, li kisis ŝin.

Eksaltante ŝi ekstariĝis, kriante: «Helpon!», hurlante pro teruro. Kaj ŝi malfermis la pordon de la kupeo; ŝi svingis siajn brakojn ekstere, freneza pro timo, provante salti, dum Moreno, konfuzegata, persvadata ke ŝi tuj ĵetos sin sur la vojon, retenis ŝin per ŝia jupo balbutante: «Sinjorino... Ho! Sinjorino».

La trajno malrapidigis sian iradon, haltis. Du fervojaj laboristoj impetegis, reagante alla malesperaj signoj de la juna virino, kiu enfalis en iliajn brakojn balbutante: «Tiu viro volis... volis... min... min...» Kaj ŝi svenis.

Oni troviĝis en la stacio de Mauzé [*Moze*]. La ĉeestanta ĝendarmaro arestis Moreno-n.

Kiam la viktimo de lia brutalaĵo rekonsciiĝis, ŝi faris sian deklaron. La aŭtoritato protokolis. Kaj la kompatinda merceristo, subminace de persekutado pro ofendego al la bonmoroj en publika loko, povis reveni hejmen nur vespere.

2a ĉapitro

Tiam mi estis ĉefredaktoro de la gazeto «*Fanal des Charentes*» [*Signallumo de Ĉarentoj*], kaj ĉiuvespere mi vidis Moreno-n, en la kafejo de la Komerco.

Ekde la posta tago de lia aventuro, li venis renkontiĝi kun mi, ne sciante kion fari. Mi ne kaŝis al li mian opinion: «Vi estas nur porko. Oni ne kondukis tiamaniere».

Li ploris; lia edzino ĵus batis lin; kaj li jam vidis sian komercon ruiniĝintan, sian malhonoritan nomon en la koto, siajn indignigitajn amikojn ne salutante plu lin. Fine li vekis al mi la kompaton, kaj mi alvokis mian kontribuanton Nito, malgranda viro, mokema kaj saĝa konsilanto, por koni lian opinion.

Li instigis min konsulti la imperian prokuroron, kiu estis unu el miaj amikoj. Mi pelis Moreno-n en lian domon, kaj iris trovi la ŝtatan altoficiston.

Mi eksciis, ke la ofendegita virino estis junulino, F-ino Henrieta Bonelo, kiu revenis Parizon, kie ŝi prenis sian diplomon de instruistino. Kaj, ĉar ŝi havas plu nek patron, nek patrinon, iris ferii en la domon de siaj geonkloj, bravaj geburĝoj, kiuj loĝis en Mauzé.

La situacio de Moreno komplikiĝis pro tio, ke la onklo plendis en tribunalo. La prokuroro konsentis delasi la aferon, se tiu plendo estis reprenita. Jen tiu, kiu necesis sukcesi.

Mi reiris en la domon de Moreno. Mi trovis lin enlitiĝinta, malsana pro emocio kaj aflikto. Lia edzino, granda viglulino, osta kaj barba, senĉese insultis lin. Ŝi enkondukis min en la dormoĉambron, kriante al mi ĉe la vizaĝo: «Vi volas vidi Moreno-n, tiun porkulon, ĉu? Jen la ulaĉo!»

Kaj ŝi stariĝis antaŭ la lito, kun surkokse la pugnoj. Mi prezentis la situacion; kaj li petegis min, ke mi iru viziti ŝian familion. La misio estis delikata; tamen mi akceptis ĝin. La

kompatindulo ne ĉesis ripeti: «Mi certigas al vi, ke mi eĉ ne kisis ŝin, ne, eĉ ne. Tion mi ĵuras al vi!»

Mi respondis: «Tio egalas, vi estas nur porko». Kaj mi ekprenis mil frankojn, kiujn li donis al mi, kaj kiujn mi povos uzi laŭ mia bontrovo por aranĝi tiun aferon.

Sed ĉar mi ne volis min riski sola en la geonkla domo, mi petis al Nito, ke li akompanu min. Li konsentis pri tio, kondiĉe ke ni forveturu senprokraste, ĉar la sekvantan tagon, vespere, li devis aranĝi urĝan aferon en La Rochelle.

Kaj du horojn pli malfrue, ni sonorigis ĉe la pordo de beleta kampara domo. Bela juna fraŭlino venis malfermi al ni. Nepre estis ŝi. Mi tute mallaŭte diris al Nito: «Diable! Mi komencas kompreni Moreno-n».

La onklo, S-ro Bareleto, ĝuste abonis al la «*Fanal*», fervora politika samreligiano, kiu plenbrake akceptis nin, laŭdis nin, gratulis nin, manpremis nin, entuziasmigata pro hejme akcepti la du redaktoroj de sia ĵurnalo. Nito flustris al mi ĉe la orelo: «Mi kredas, ke ni povos aranĝi la aferon de la porko Moreno».

Tuj post kiam la nevinino malproksimiĝis; mi ekstraktis la delikatan demandon. Mi aludis la verŝajnan skandalon; mi pretekstis la neeviteblan domaĝon, kiun la juna knabino suferus post la bruo de tia afero, ĉar neniam oni kredus pri simpla kiso.

La ulo ŝajnis nedecidema; sed li povis nenion decidi sen la ĉeesto de sia edzino, kiu revenos hejmen nur malfrue vespere. Subite li eligis triumfokrion: «Jen, mi ĵus havis bonegan ideon, mi tenas vin, mi konservas vin. Ambaŭ vi vespermanĝos kaj dormos tie ĉi; kaj kiam mia edzino estos reveninta, mi esperas, ke ni komprenos nin reciproke».

Nito malcedis; sed la deziro eltiri tiun porkon Moreno el la afero konvinkis lin, kaj ni akceptis la inviton.

La onklo, ĝojradia, leviĝis, alvokis sian nevinon, kaj proponis al ni promenadon en sia proprietaĵo, proklamante: «Ĝis vespere la seriozaj aferoj».

Nito kaj li ekparolis pri politiko. Koncerne min, mi baldaŭ troviĝis je kelkaj paŝoj malantaŭe, apud la juna knabino. Ŝi estis vere ĉarma, tre ĉarma!

Prenante senfinajn antaŭzorgojn, mi ekis paroli al ŝi pri ŝia aventuro, por provi ke ŝi fariĝu aliancanino.

Sed ŝi aperis tute ne konfuza, eĉ ne iom; ŝi aŭskultis min aspektante kiel iu, kiu multege amuziĝas.

Mi diris al ŝi: «Pensu do, Fraŭlino, pri ĉiuj malagrabraĵoj, kiujn vi havos. Necesos al vi, ke vi aperu antaŭ la tribunalo, alfrontu la malicajn rigardojn, parolu antaŭ ĉiuj ĉeestantoj, publike rakontu tiun malfeliĉan scenon de la vagono. Diru, inter ni, ĉu vi ne agus pli bone, se vi dirus nenion, admonus tiun petolulon, kaj ne alvokante la fervojajn laboristojn, vi tutsimple ŝanĝus kupeon?»

Ŝi ekridis: «Estas ververe, tiu kiun vi diras! Sed kion vi volas? Mi timis, kaj kiam oni timas, oni ne rezonas plue. Kiam mi komprenis la situacion, mi ja bedaŭris miajn kriojn; sed estis tro malfrue. Ankaŭ pensu, ke tiu stultulo impetis al mi kiel furiozulo, ne prononcante vorton, kun vizaĝo de frenezulo. Mi eĉ ne sciis, kion li volis al mi».

Ŝi fronte rigardis al mi, trankvile kaj ne timigata. Mi diris al mi: «Sed tiu knabino, ŝi estas viglulino. Mi komprenas kial Moreno, tiu porko trompiĝis».

Mi gaje ŝercante reparolis: «Diru, Fraŭlino, konsentu, ke li estis pardonebla, ĉar fine, oni ne povas sin trovi vidalvide al tiel bela knabino kiel vi, kaj ne senti la tre kompreneblan deziron kisi ŝin».

Ŝi ridis ankoraŭ pli intense, briligante siajn tutajn dentojn: «Inter la deziro kaj la agado, Sinjoro, devas esti loko por la respekto».

La frazo estis sprita, kvankam iom malklara. Mi abrupte demandis: «Nu, ni vidu, se mi kisas vin, nun tuj, kion vi farus?»

Ŝi haltis, pririgardante min desupre malsupren, kaj ŝi trankvile diris: «Ho, vi, tio ne estas la sama afero!»

Tion mi ja scias, evidente, ke tio ne estas la sama afero, ĉar oni nomas min en la tuta provinco «la bela Labarbo». Tiam mi havis tridek jarojn, sed mi demandis: «Kial tio?»

Ŝi ŝultrolevis, kaj respondis: «Jen! Ĉar vi ne estas tiel stulta kiel li». Poste ŝi aldiris, subrigardante al mi: «Nek tiel malbela».

Antaŭ ol ŝi povis fari movon por eviti min, mi survangan almetis kison. Ŝi flanken saltis, sed tro malfrue. Poste ŝi diris: «Nu! Vi ankaŭ, vi ne ĝenas vin. Sed ne rekomencu tion ludon».

Aspektante la plej humila eble, mi duonlaŭte diris: «Ho! Fraŭlino, pri mi, se mi ankore havus deziron, estus aperi antaŭ tribunalo, por la sama kaŭzo ol Moreno».

Siavice ŝi demandis: «Kial tio?» Rigardante serioze al ŝi, profunde en la okuloj, mi diris: «Ĉar vi estas unu el la plej belaj estaĵoj kiuj estas; ĉar tio estus por mi kiel diplomo, titolo, gloro, ke mi volu violenti vin. Ĉar oni dirus, post esti vidinta vin: «Jen vidu! Labarbo ja meritas tion, kio okazas al li, sed tamen li estas bonŝanca».

Ŝi denove plenkore ekridis: «Kiom vi estas amuza!» Ŝi ne finis diri la vorton «amuza», ke mi jam plenbrake tenis ŝin, kaj kovris ŝin per voremaj kisoj ĉie, kie mi trovis lokon, en la haroj, sur la frunto, sur la okuloj, iafoje sur la buŝo, sur la vangoj, ĉie sur la kapo, ĉar ŝi ĉiam malkovris kontraŭvole anguleton por protekti la aliajn.

Fine, ŝi liberiĝis, ruĝa kaj ofendita: «Vi estas krudulo, Sinjoro, kaj vi bedaŭrigis min, ke mi aŭskultis vin».

Mi ekkaptis ŝian manon, iom konfuzata, balbutante: «Pardonon, pardonon, Fraŭlino. Mi ofendis vin; mi estis brutala! Pardonu al mi. Se vi sciu!...» Mi vane serĉis pravigon.

Post momento, ŝi prononcis: «Nenion mi devas scii, Sinjoro».

Sed mi ĵus trovis; mi ekkriis: «Fraŭlino, sed jen unu jaro, ke mi jam amas vin!»

Ŝi estis vere surprizata, kaj levis la okulojn. Mi reparolis: «Jes, Fraŭlino, aŭskultu. Mi ne konas Moreno-n, kaj mi ja mokas lin. Tute egalas al mi, ke li iru en malliberejon, kaj aperu antaŭ la tribunaloj. La pasintan jaron, mi vidis vin tie ĉi, vi estis tie antaŭ la krado. Kiam mi ekvidis vin, mi estis skuita, kaj via bildo ne forlasis plu min. KREDU min aŭ ne kREDU min, tio egalas al mi. Mi trovis vin adorinda; via rememoro estris min; mi volis revidi vin; mi ekkaptis la pretekston de tiu stultulo de Moreno; kaj jen mi. La cirkonstancoj transpasigis min tra la limoj, pardonu al mi, mi vin petegas, pardonu al mi».

Ŝi serĉis la verecon en mia rigardo, denove preta rideti; kaj ŝi murmuris: «Blagemulo!»

Mi levis la manon, kaj per sincera tono (mi eĉ kredas, ke mi estis sincera): «Mi asertas al vi, ke mi ne mensogas».

Ŝi ironie diris: «Kaj mi devas vin kredi!»

Ni estis solaj, tute solaj, Nito kaj la onklo ĵus malaperis en la kurbiĝajn aleojn; kaj mi faris al ŝi veran amdeklaron, longan, mildan, premante kaj kisante ŝiajn fingrojn. Ŝi aŭskultis tion, kiel agrablan kaj novan aferon, ne bone sciante tion, kion ŝi devis kredi.

Fine mi eksentis ekscitecon kaj pensis tion, kion mi diris; mi estis pala, premegata, tremanta; kaj milde mi ĉirkaŭprenis ŝin je la talio.

Mi mallaŭte parolis al ŝi en la malgrandaj bukraj haroj super la orelo. Ŝi aspektis senviva, tiom ŝi restis revema.

Poste ŝia mano trafis la mian kaj premis ĝin; mi malrapide premis ŝian talion per tremanta kaj ĉiam grandiganta ĉirkaŭpremado; ŝi tute ne moviĝis plu; mi tuŝetis ŝian vangon per mia buŝo; kaj subite miaj lipoj, ne serĉante, trovis la ŝiajn. Estis longa, tre longa kiso; kaj ĝi ankoraŭ daŭrus longe, se mi ne aŭdus: «hm, hm!» je kelkaj paŝoj malantaŭ mi.

Ŝi fuĝis tra masivo. Mi turnis min, kaj ekvidis Nito-n, kiu ree kuniĝis kun mi.

Li provoke ekstariĝis meze de la vojo, kaj ne ridante: «Nu! Ĉu tiamaniere vi aranĝas la aferon de la porko Moreno?»

Mi malmodeste respondis: «Mia kara, oni faras, kion oni povas! Kaj kun la onklo, kian rezulton vi sukcesis? Persone, mi prirespondas de la nevino».

Nito deklaris: «Kun la onklo, mi estis malpli feliĉa».

Kaj mi prenis lian brakon por reveni hejmen.

3a ĉapitro

La vespermanĝo definitive perdis mian kapon. Mi sidiĝis apud ŝi, kaj mia mano senĉese renkontis ŝian manon sub la tablotuko; mia piedo premis la ŝian; niaj rigardoj kuniĝis, miksiĝis.

Poste oni iris promenadi sub la lunhelo, kaj mi murmuris en ŝian animon, ĉiujn tenerecojn, kiujn mia koro blovis al mi. Mi tenis ŝin, kiu alpremiĝis al mi, kisante ŝin ĉiumomente, malsekigante miajn lipojn al la ŝiaj. Antaŭ ni, la onklo kaj Nito diskutis. Iliaj ombroj grave sekvis ilin sur la sablo de la vojoj.

Oni revenis hejmen. Kaj baldaŭ la telegrafocicisto alportis depeŝon el la onklino, ĝi anoncis, ke ŝi revenos nur la sekvantan tagon, matene je la sepa, per la unua trajno.

La onklo diris: «Nu, Henrieta, iru do montri iliajn dormoĉambrojn al tiuj sinjoroj». Ni manpremis nian gastiganton, kaj ni supreniris. Unue ŝi kondukis nin en la loĝejo de Nito, kaj li flustris al mi ĉe la orelo: «Certe ne, neeble, ke ŝi alkondukis nin unue al via dormoĉambro!» Poste ŝi gvidis min al mia lito. Tuj kiam mi estis sola kun ŝi, denove mi ekkaptis ŝin enbrake, provante frenezigi ŝiajn sensojn kaj venki ŝian reziston. Sed, kiam ŝi sentis sin preskaŭ sveneti, ŝi fuĝis.

Mi enŝoviĝis en la littukojn, tre ĉagrenata, tre maltrankvila, kaj tre konfuzata, bone sciante ke mi ne multe dormos, serĉante kian mallertaĵon mi povis fari, kiam oni milde frapis kontraŭ mia pordo.

Mi demandis: «Kiu estas tie?»

Leĝera voĉo respondis: «Estas mi».

Mi hastege vestis min; mi malfermis, ŝi eniras. «Mi forgesis, ŝi diris, demandi al vi, kion vi kutime trinkas matene: ĉu ĉokoladon, ĉu teon aŭ kafon?»

Mi impetege brakumis ŝin, avide karesante ŝin, balbutante: «Mi trinkas... mi trinkas... mi trinkas...» Sed ŝi ŝoviĝis el miaj brakoj, blovestingis la lumon, kaj malaperis.

Mi restis sola, furioza, en la mallumo, serĉante alumetojn, ne trovante ilin. Fine mi malkovris ilin, kaj mi eliris en la koridoron, duone freneza, kun enmane mia kandelingo.

Kion mi tuj faros? Mi ne rezonis plu, mi volis trovi ŝin; mi volis ŝin. Kaj pensante nenion, mi faris kelkajn paŝojn. Poste mi subite pensis: «Sed se mi enirus en la dormoĉambron de la onklo, kion mi dirus?...» Kaj mi restadis nemoviĝante, la kapo malplena, la koro batanta. Post kelkaj sekundoj, la respondo venis al mi: «Be jes! Mi diros, ke mi serĉis la dormoĉambron de Nito, por paroli kun li pri urĝa afero».

Kaj mi komencis inspekti la pordojn, strebante malkovri ŝian pordon. Sed nenio povis gvidi min. Hazarde, mi ekkaptis ŝlosilon, kiun mi turnis. Mi malfermis, mi eniris... Henrieta, sidanta en ŝia lito, konsternata, rigardis al mi.

Tiam, mi delikate puŝis la riglilon; kaj alproksimiĝante sur la pintoj de la piedoj, mi diris al ŝi: «Mi forgesis, Fraŭlino, peti al vi ion por legi». Ŝi baraktis; sed baldaŭ mi malfermis la libron, kion mi serĉis. Mi ne diros la titolon. Vere estis la plej mirinda el la romanoj, kaj la plej dia el la poemoj.

Kiam la unua paĝo estis transturnita, ŝi lasis min tralegi la libron laŭ mia volo; kaj mi foliumis tiom da ĉapitroj, ke niaj kandeloj eluziĝis ĝis la fino.

Poste, dankespriminte ŝin, mi ŝtelpaŝe reiris al mia dormoĉambro, kiam brutala mano haltigis min, kaj voĉo, tiu de Nito, flustris en mian orelon: «Ĉu vi do ne ankoraŭ finis aranĝi la aferon de la porko Moreno?»

Tuj post kiam estis la sepa matene, ŝi mem alportis al mi ĉokoladotason. Neniam mi gustumis tian trinkaĵon. Oni preskaŭ povus morti pro tia ĉokolado, ĝi estis mezdolĉa, velura, parfumita, ebria. Mi ne povis demeti mian buŝon de la agrablegaj randoj de la taso.

Apenaŭ la junulino estis elirinta, Nito eniris. Li ŝajnis iom nerva, incitata kiel homo, kiu ne multe dormis; li diris al mi per malafabla tono: «Se vi daŭrigas, vi scias, vi finos aĉigi la aferon de la porko Moreno».

Je la oka, la onklino alvenis. La diskuto daŭris mallonge. La bravaj geuloj deprenos sian plendon, kaj mi lasos kvincent frankojn al la malriĉuloj de la lando.

Tiam, ili volis restigi nin por pasigi la tagon. Oni eĉ aranĝus ekskurson por iri viziti ruinŝtonojn. Henrieta, malantaŭ la dorso de siaj geonkloj, faris al mi jesajn kapsignojn: «Jes, restu do». Mi konsentis, sed Nito persistege insistis por foriri.

Mi aparte alparolis lin; mi petis lin, mi petegis lin; mi diris al li: «Ek! mia eta Nito, faru tion por mi». Sed li ŝajnis furiozigata, kaj ripetis al mi ĉe la vizaĝo: «Sufiĉas! Ĉu vi aŭdas? Sufiĉas pri la afero de la porko Moreno».

Mi estis ja devigita ankaŭ foriri. Tio estis unu el la momentoj la pli malagrablaj de mia vivo. Mi ja daŭrigus aranĝi tiun aferon dum mia tuta vivado.

En la vagono, post la energiaj kaj silentaj adiaŭaj manpremoj, mi diris al Nito: «Vi estas nur brutalo». Li respondis: «Mia etulo, vi komencis serioze inciteti min».

Alveninte al la oficejo de la «*Fanal*», mi ekvidis homamason, kiu atendis nin... Oni kriis, tuj kiam oni vidis nin: «Nu, ĉu vi aranĝis la aferon de Moreno, tiu porkulo?»

La tuta loĝantaro de La Rochelle estis konsternata. Nito, kies malbona humoro disflugis survoje, malfacilege ne ridis deklarante: «Jes, tio estas farita, dank'al Labarbo».

Kaj ni iris viziti Moreno-n en lian domon.

Li estis sterniĝinta en brakseĝo, kun sinapaj kataplasmoj sur la kruroj, kaj kompresoj el malvarma akvo sur la kranio, duonsvenanta pro angoro. Kaj li senĉese tuis, per tusetoj de agonianto, kaj neniu povis ekscii la devenon de tiu rinito. Lia edzino rigardis al li per okuloj de tigrino, preta vori lin.

Tuj post kiam li ekvidis nin, li estis ekkaptata de tremado, kiu skuis liajn manartikojn kaj la genuojn. Mi diris: «Tio estas en ordo, kanajlo, sed ne rekomencu».

Sufokante, li stariĝis, ekprenis miajn manojn, kisis ilin kiel princajn manojn, ploris, preskaŭ senkonsciiĝis, kisis Nito-n, li eĉ kisis S-inon Moreno, kiu per puŝo forĵetis lin en lian brakseĝon.

Sed neniam li resaniĝis post tiu afero, pro lia emocio kiu estis tro brutala.

En la tuta lando, nun oni nur nomis lin «Moreno, tiu porkulo», kaj tiu epiteto trapikis lin kiel spadopiko, ĉiufoje kiam li aŭdis ĝin.

Kiam sur la strato bubaĉo kriis «porkon», li instinkte turnis la kapon. Liaj amikoj turmentis lin per hororaj ŝercoj, demandante al li, ĉiufoje kiam li manĝis ŝinkon: «Ĉu ĝi estas el vi?»

Du jarojn pli poste li mortis.

Pri mi, en 1875 mi kandidatis al parlamento, kaj mi faris aferan viziton al la nova notario de Tusero, notaria moŝto Belonklo. Granda virino, ampleksa kaj bela, akceptis min.

– Ĉu vi rekonas min? ŝi diris.

Mi balbutis:

– Sed... ne... Sinjorino.

– Henrieta Bonelo.

– Ha!

Kaj mi sentis min paliĝi.

Ŝi ŝajnis plenkomforte senti sin, kaj ridetis rigardante al mi.

Post kiam ŝi lasis min sola kun sia edzo, li ekprenis miajn manojn, kiujn li premis ĝis pisti ilin: «Jen longatempe, kara sinjoro, ke mi volas viziti vin. Mia edzino tiom parolis al mi pri vi. Mi scias... jes, mi scias la doloran cirkonstancon en kiu vi konis ŝin, mi ankaŭ scias kiom vi estis perfekta, plena da delikateco, takto, sindonemo, koncerne la aferon...» Li hezitis, kaj pli mallaŭte, kvazaŭ li dirus fivorton, li prononcis: «Koncerne la aferon de Moreno, tiu porkulo».

La 21an de novembro 1882

LA ULĈJO MIAVEŜTO

En la oficejo, la ulĉjo Miaveŝto estis rigardata kiel originalulo. Li estis maljuna bonkarakterata oficisto, kiu eliris el Parizo nur unufoje dum sia vivo.

Tiam ni travivis la lastajn tagojn de julio, kaj ĉiu el ni, ĉiudimanche, iris ruli sin surherbe, aŭ trempi sin enakve en la ĉirkaŭaj kamparoj. Asnières, Argenteuil, Chatou, Bougival, Maisons, Poissy, ĉiu el tiuj urbetoj havis siajn kutimulojn kaj siajn fanatikulojn. Ĉiu pasie diskutis pri la meritoj kaj la avantaĝoj de ĉiuj tiuj famaj kaj ravaj lokoj por la Parizaj oficistoj.

La ulĉjo Miaveŝto deklaris:

– Aro de Panurgaj ŝafoj²! Via kamparo, ĝi ne estas tiom beleta!

Ni demandis al li:

– Nu, kaj vi, Miaveŝto, ĉu neniam vi promenas?

– Pardonu! Mi promenas per omnibuso. Kiam mi bone tagmanĝis, ne hastante min, ĉe la vinvendisto, kiu estas malsupre de mia apartamentaro, mi planas mian itineron per Pariza plano kaj la indikato de movadoj de omnibusoj sur ĉiu linio. Kaj poste mi supreniras sur mian imperialon, mi malfermas mian ombrelon, kaj antaŭen. Ho! Kiom aferojn mi vidas, pli multe ol vi, hej! Mi ŝanĝas kvartalojn. Tio estas kvazaŭ mi vojaĝus tra la mondo, tiom la popolo estas malsimila de iu strato al alia. Mi pli bone konas mian Parizon ol neniu. Kaj nenio estas pli amuza ol la interetaĝoj. Tion, kion oni vidas ĉi-ene, nur per ekrigardo, tio estas neimagebla. Oni divenas geedzajn scenojn, nur ekvidante la kapon de viro kiu krias; oni amuziĝas pasante antaŭ la butikoj de la barbiroj, kiuj delasas la nazon de la sinjoro, tute blankan de sapo por rigardi en la strato. Oni okulumas al la ĉapelistinoj, senkostaj okulumadoj, nur por ŝerci, ĉar oni ne havas tempon por malsupreniri. Ha! Kiom aferojn oni vidas!

Tio estas teatraĵo, bona, vera teatro, la naturteatro, spektata laŭtrote de du ĉevaloj. Oho! Mi ne interŝanĝus miajn omnibusajn promenadojn kontraŭ viaj stultaj promenadoj en la arbaretoj.

Ni demandis al li:

– Tion gustumu do, Miaveŝto, iru unufoje al la kamparo, nur por provi.

Li respondis:

– Mi jam iris, unufoje, antaŭ dudek jaroj, kaj neniu retrompos min!

– Tion rakontu al ni, Miaveŝto.

– Tion, kiom vi volas. Jen la afero: ĉu vi konis Trinkvino-n, la eks-redaktistan komizon, kiun oni moknomis Trinkakvon?

– Jes, perfekte.

² **Ŝafoj de Panurgo** (laŭ verko de Rabelezo): Ŝafoj kiuj dronis, sekvinte la unuan, ĵetitan en la maron.

– Li estis mia samoficano. Tiu kanajlo posedis domon en Colombes, kaj li senĉese invitis min, por ke mi pasigu dimanĉon ĉe li. Li diris al mi:

– Venu do, Miakuloto (li ŝerce nomis min Miakuloto). Vi vidos la beletan promenadon, kiun ni faros.

Mi, kiel stultulo, lasis min trompi, kaj iun matenon, mi forveturis al Colombes per la trajno je la oka. Mi alvenis en iun specon de urbo, kampara urbeto, kie ni vidas nenion. Kaj finfine mi troviĝis en la fino de mallarĝa strateto, inter du muroj, antaŭ malnova ligna pordo kun fera sonorileto.

Mi sonorigis. Mi longe atendis, kaj poste oni malfermis al mi. Kiu malfermis al mi? Tion mi ne sciis ĉe la unua ekrigardo: ĉu estis virino aŭ simiino? Tio estis maljuna, estis malbela, vestita per malnovaj tolaĵoj, tio ŝajnis malpura kaj malica. Tio havis kortobirdajn plumojn en la haroj, kaj ŝajnis voli min vori.

Ŝi demandis:

– Kion vi deziras?

– S-ro Trinkvino.

– Kion vi volas al li, al S-ro Trinkvino?

Pro la pridemandado de tiu furiozulino, mi sentis min malkomforte. Mi balbutis:

– Sed... li atendas min.

Ŝi reparolis:

– Ha! vi estas tiu, kiu venas por la tagmanĝo!

Tremante, mi balbutis "jes".

Tiam, turnante sin al la domo, ŝi ekkriis per furiozema voĉo:

– Trinkvino, jen via viro!

Ŝi estis la edzino de mia amiko. Tuj la ulĉjeto Trinkvino aperis sur la sojlo de iu speco de domaĉo el gipso, kovrita per zinka tegmento, kaj kiu similis braĝujon. Li estis vestita per pantalonon el blanka tiko tute makulita, kaj malpura panama ĉapelo.

Post la manpremaĵoj, li forkondukis min en tion, kion li nomis sia ĝardeno, tio estis en la fino de koridoro, kiun formis gigantaj muroj, eta tera kvadrato, granda kvazaŭ poŝtuko, kaj ĉirkaŭita per domoj tiel altaj, ke la suno penetris ĉi-enen nur du aŭ tri horojn ĉiutage. Penseoj, diantoj, keirantoj, kelkaj rozarbetoj, agoniis funde de tiu puto sen aero, kaj varmigita kiel forno pro la reflektadoj de la tegmentoj.

– Mi ne havas arbojn, diris Trinkvino, sed la muroj de la najbaroj same utilas. Mi havas ombbron kiel en arbaro.

Poste tio li prenis min per unu butono de mia jakto, kaj mallaŭte diris al mi:

– Vi tuj faros komplezon al mi. Vi vidos mian edzinon. Ŝi estas dorna, ĉu? Hodiaŭ, ĉar mi invitis vin, ŝi donis al mi purajn vestaĵojn, sed se mi makulus ilin, tio estus vera katastrofo; tial mi petas vin akvumi miajn plantojn.

Mi konsentis pri tio. Mi demetis mian jakon. Mi kuspis la manikojn de mia ĉemizo, kaj mi komencis vigle manipuli la stangon de speco de pumpilo, kiu siblis, blovis, raslis kiel ftizulo, por nur ellasi flueton da akvo, simila al la elfluado de fontano Wallace³. Dek minutoj estis necesaj, por pleniĝi unu akvilon. Mi estis ŝvitoplena. Trinkvino gvidis min:

– Tie ĉi, – al tiu planto; – ankoraŭ iom. – Sufiĉe; – al tiu alia planto.

La truita akvilo likis, kaj miaj piedoj ricevis pli da akvo ol la floroj. La malsupro de mia pantalonon, malseka kiel spongo, sorbiĝis per koto. Kaj, dudekfoje seninterrompe, mi rekomencis, mi ree trempis miajn piedojn, mi daŭrigis ŝviti ĝemigante kaj balancante la stangon de la akvopumpilo. Kaj kiam, lacega, mi volis ĉesi, la ulĉjo Trinkvino, petegante, tiris al mi la brakon:

³ **La fontanoj Wallace:** tiel oni nomas, dissemittajn en tuta Parizo, ĉirkaŭ cent putetojn kun ĉiamfontanta trinkebla akvo. Ili estas gisferaj kaj farbitaj per verda oleofarbo kaj estis donacitaj de la angla siro Rikardo Wallace en 1875.

– Ankoraŭ unu akvilo, – nur unu, – kaj tio estos finiĝinta.

Por danki min, li donis al mi rozon, grandan rozon, sed kiam ĝi tuŝis mian butontruon, tuj ĝi tute senfoliiĝis, lasante al mi, kiel dekoracion nur verdan malgrandan piron, malmolan kiel ŝtono. Mi miris, sed nenion mi diris.

Tiam ni aŭdis la malproksiman voĉon de S-ino Trinkvino:

– Fine, ĉu vi tuj venos? Kiam mi diras al vi, ke tio estas pretigita!... Ni iris al la braĝujo.

Se la ĝardeno troviĝis enombre, kontraŭe la hejmo troviĝis plensune... kaj la dua ĉambro de ŝvitbanejo estas malpli varma ol la manĝoĉambro de mia kamarado.

Tri teleroj kaj tri malbone lavitaj forketoj el stano kuŝis sur tablo de flava ligno. Meze de la tablo, argila vazo enhavis boligitan bovaĵon, revarmigitan kun terpomoj. Ni ekmanĝis.

Granda karafo plena je akvo, iomete kolorita per ruĝo, altiris mian atenton. Trinkvino, konfuza, diris al sia edzino:

– Diru do, bonulino mia, por la okazo, ĉu vi ne povus doni iom da pura vino?

Ŝi furioze rigardis fikse al li:

– Por ke vi ambaŭ ebriiĝu, ĉu ne? Kaj vi restadu ĉi tie kriegante dum la tuta tago! Ne, dankon por la programo!

Li silentis. Post la raguo, ŝi alportis alian pladon de terpomoj preparitaj kun lardo. Kiam, silente, tiu manĝaĵo estis finiĝinta, ŝi deklaris:

– Jen la tuto. Nun foriru.

Trinkvino, konsternata, rigardadis al ŝi.

– Sed la kolombo... la kolombo, kiun vi senplumigis ĉimatene, ĉu?

Ŝi metis siajn manojn sur la koksojn:

– Ĉu vi ne sufiĉas manĝi, eble. Ĉar vi alkondukas ulojn hejmen, tio ne estas motivo por vori ĉion, kio estas en la domo. Kaj ĉivespere, kion mi manĝos?

Ni leviĝis. Kaj Trinkvino flustris al mi ĉe la orelo:

– Atendu min iomete, kaj ni tuj foriros.

Poste li iris en la kuirejon, kie lia edzino ĵus eniris. Kaj mi aŭdis:

– Donu al mi dudek soldojn, mia karulino.

– Kion vi volas fari per dudek soldoj?

– Sed neniam ni scias, kio povos okazi. Havi iom da mono, ĉiam estas bona kaj pli singardema.

Ŝi hurlis, por ke mi aŭdu ŝin:

– Ne, mi ne donos monon al vi! Ĉar tiu viro manĝis ĉe vi, la malplej, ke li povus fari, estus ke li pagu viajn elspezojn de la tago.

La ulĉjo Trinkvino revenis al mi. Ĉar mi volis esti ĝentila, mi klinis min antaŭ la dommastrino balbutante:

– Sinjorino... dankojn... gracia akcepto...

Ŝi respondis:

– Estas bone. Sed ne revenigos lin tute ebriega, ĉar vi traktos kun mi, mi avertas vin!

Ni foriris.

Ni devis, plensune, trapasi ebenaĵon nuda kiel tablo.

Mi volis pluki planton laŭlonge de la vojo, kaj mi eligis krion pro la doloro. Tio horore suferigis mian manon. Oni nomas tiujn herbojn kiel urtikojn. Kaj poste, ĉie la sterko fetoris, sed tio fetoris ĝis naŭzi vin.

Trinkvino diris al mi:

– Pacienca iom, ni tuj alvenos ĉe la bordo de la rivero.

Fakte, ni alvenis ĉe la bordo de la rivero. Tie, la ŝlimo kaj la malpura akvo fetoris, kaj tia suno faligis sur tiu akvo, ke miaj okuloj brulvundis.



Mi petis Trinkvino-n, ke ni eniru ien. Li penetrigis min en iun specon de kabano plenplena de viroj, iun tavernon por ŝipanoj de sensala akvo. Li diris al mi:

– Tio ne estas elmontrata, sed ĉi-ene oni bonege estas.

Mi malsatis. Mi mendis omleton. Sed jen, ekde la dua glaso da vino, tiu fripona Trinkvino perdis la saĝon, kaj mi komprenis kial lia edzino servis al li nur vinon treege baptita per akvo.

Li parolŝutis, leviĝis, volis fari akrobataĵojn, entrudiĝis kiel paciganto en la kverelo de du ebriuloj, kiuj interbatalis, kaj ni ambaŭ estus batmortigitaj sen la interveno de la trinkestro.

Mi kuntrenis lin, subtenante lin kiel oni subtenas la drinkulojn, ĝis la unua arbataĵo, kie mi kuŝiĝis lin. Mi mem kuŝiĝis flanke al li. Kaj ŝajnis, ke mi ekdormis.

Certe ja, ni dormis longe, ĉar kiam mi eldormiĝis jam estis la nokto. Trinkvino ronkis flanke al mi. Mi skuis lin. Li stariĝis, sed li estis ankoraŭ ebria, sed tamen iom malpli.

Kaj ni reforiris, en la tenebroj, tra la ebenaĵo. Trinkvino asertis, ke li povas sin orienti. Li devigis min turni maldekstren, poste dekstren, poste maldekstren... Ni vidis nek la ĉielon, nek la teron, kaj fine ni troviĝis vojerari meze de ia arbaro de palisoj, kiuj atingis la alton de la nazo. Verŝajne ke tio estis vinberejo kun siaj spaliroj. Ne gasbeko al la horizonto. Ni cirkulis ĉi-ene eble dum unu aŭ du horoj, turnirante, ŝanceliĝante, etendante la brakojn, frenezaj, ne trovante la finon, ĉar ni senĉese ĉirkaŭiris.

Fine, Trinkvino falis sur bastono, kiu ŝiris al li la vangon, kaj sen emocio li restis sidanta surtere, eligante plengorĝe longdaŭrajn kaj sonoregajn "La-i-tu!", dum mi plenforte kriis "Helpon!", ekflamigante kandelalumetojn por lumigi la vojon al eblaj helpantoj, kaj ankaŭ por kuraĝigi min.

Fine, malfruiĝanta kamparano aŭdis nin, kaj montris al ni la vojon.

Mi kondukis Trinkvino-n ĝis lia domo. Sed dum mi estis lasonta lin sur la sojlo de lia ĝardeno, bruske la pordo malfermiĝis, kaj lia edzino aperis, kun enmane kandelo. Ŝi terure timigis min.

Poste, tuj post kiam ŝi ekvidis sian edzon, kiun ŝi devis atendi jam de la noktiĝo, ŝi kriis, impetante al mi:

– Ha! kanajlo, mi ja sciis, ke vi rekonduku lin tute ebria!

Nu, mi fuĝis, kurante ĝis la stacidomo, kaj ĉar mi timis, ke la furiozulino postkuris min, mi enfermis min en la necesejojn, ĉar la unua trajno devis pasi nur unu duonhoron pli poste.

Jen la motivo, por kiu mi neniam geedziĝis, kaj mi neniam plu eliras de Parizo.

24an de februaro 1885

NORMANDA ŜERCO

Por A. de Joinville.

La procesio disvolviĝis en la kava vojo, ombrita de la grandaj arboj kiuj kreskis sur la talusoj de la farmbienoj. Enkape alvenis la novaj geedzoj, poste la gepatroj, poste la gastoj, kaj la landaj malriĉuloj, kaj la knaboj kiuj rondiris ĉirkaŭ la defilado kiel muŝoj, trapasis inter la vicoj, grimpis al la branĉoj por plej bone vidi.

La nova edzo, Johano Pato, estis bela knabego, la plej riĉa landa farmisto. Li estis precipe furioza ĉasisto, kiu perdis la komunan saĝon por kontentigi tiun pasion, kaj elspezis multan monon por siaj hundoj, siaj gardistoj, siaj ĉasputuroj kaj siaj pafiloj.

La nova edzino, Rozalia Ruselo, antaŭe estis tre amindumita de ĉiuj amsopiraj junuloj de la ĉirkaŭaĵoj, ĉar oni trovis ŝin plaĉa, kaj oni sciis ŝin multe dotita; sed ŝi elektis Pato-n, eble ĉar li pli multe plaĉis al ŝi ol la aliaj, sed certe ankaŭ, kiel saĝa Normandino, ĉar li havis plimulte da ekuoj.

Kiam ili turnis la grandan barilon de la edza farmbieno, kvardek pafoj eksplodis, sed oni ne vidis la pafistojn kaŝitajn en la fosaĵoj. Je tiu bruo granda gajeco ekkaptis la virojn, kiuj ekis mallerte svingodanci en siaj festaj vestaĵoj; kaj Pato, forlasante sian edzinon, eksaltis al bienservisto, kiun li ekvidis malantaŭe arbo, ekkaptis lian armilon, kaj mem pafis ĝojsaltante kiel ĉevalido.

Poste oni denove vojiris sub la pomarboj, kiuj jam multpezis pro la fruktoj, tra la alta herbo, meze de la bovidoj kiuj rigardis per siaj grandaj okuloj, leviĝis malrapide kaj restadis starantaj kun la muzeloj streĉitaj al la geedziĝofesto.

Alproksimante de la manĝo, la viroj reiĝis gravaj. Iuj viroj, la riĉuloj, estis kapvestitaj per altaj brilaj ĉapeloj el silko, kiuj ŝajnis nekonvenaj en tiu loko; la aliaj surmetis malnovajn kapvestojn el longaj viloj, kiuj ŝajnis el haŭto de talpo; la plej modestaj estis nur kronitaj per kaskedoj.

Ĉiuj virinoj surhavis ŝalojn, malfalditaj sur la dorso, pintojn de tiuj ŝaloj ili ceremonie retenis per manoj. Tiuj ŝaloj estis ruĝaj, buntaj, flagraj; kaj ilia brilo ŝajnis mirigi la nigrajn kokinojn sur la sterkamaso, la anasojn borde de la marĉeto, kaj la kolombojn sur la pajlotegmentoj.

La tuta verdo de la kamparo, la verda de la herbo kaj la arboj, ŝajnis incitegita pro la kontakto kun tiu brula purpuro, kaj la du koloroj tiel najbaraj fariĝis blindigaj sub la tagmeza sunardo.

Tie for ĉe la fino de la volbo formita de la pomarboj, la farmbienego ŝajnis atendi. Vaporo eliris el la pordo kaj la malfermitaj fenestroj, kaj malsubtila odoro de nutraĵo eligis el la vasta konstruaĵo, el ĉiuj aperturoj, eĉ el la muroj mem.

Kvazaŭ serpento, la gasta sekvantaro longiĝis tra la korto. La unuaj, atingante la domon rompita la homoĉenon kaj disiĝis, dum la aliaj daŭrigis eniri tra la malfermita barilo. Nun la fosaĵoj estis plenaj de scivolemaj knaboj kaj malriĉuloj; kaj la pafoj ne ĉesis, eksplodante el ĉiuj flankoj samtempe, miksante al la aero pulvofumon, kaj tiu odoro ebrigas kiel la absintaĵo.

Antaŭ la pordo, la virinoj frapetis sur siaj roboj por faligi la polvon, malnodis la rubandojn al siaj ĉapeloj, demetis siajn ŝalojn, kaj metis ilin sur siaj brakoj, kaj eniris en la domon por definitive sin malembarasi de tiuj ornamaĵoj.

Oni primetis la tablon en la granda kuirejo, kiu povis enteni cent personojn.

Oni altabliĝis je la dua, kaj je la oka oni ankoraŭ manĝis. La viroj malbutonitaj kun la manikoj kuspitaj kaj kun la vizaĝoj ruĝiĝaj englutis same kiel abismoj. La flava cidro

flagretis, ĝoja, klara kaj orkolora, en la grandaj glasoj, apud de la kolora vino, de la malhela vino, sangokoloro.

Inter ĉiu manĝaĵo oni faris truon, *la normandan truon*, tio estas oni glutis glason da pombrando, kiu enverŝis la fajron en la korpojn, kaj la frenezon en la kapojn.

De tempo al tempo gasto plenege kvazaŭ barelo eliris ĝis la proksimaj arboj, malplenigis la vezikon, kaj eniris malsatega kiel lupoj.

La farmistinoj, skarlataj, premitaj, la korsaĵoj ŝtreĉitaj kiel balonoj, duone tranĉitaj pro la korseto, ŝvelaj desupre malsupren, ĉetable restadis sidantaj pro la diskreteco. Sed unu el ili pli ĝenita eliris, tiam ĉiuj sinsekve leviĝis. Ili revenis pli ĝojaj, pretaj por la ridado. Kaj la ŝercoj la malplej spritaj komencis.

Estis lavangoj da maldecaĵoj, kiuj deverŝiĝis tra la tablo, kaj ĉiuj rilate al la nupta nokto. La tuta armilaro de la kamparana spriteco estis elverŝita. Jam de antaŭ cent jaroj, en la similaj okazoj, oni uzis la samajn malprudaĵojn, kaj kvankam ĉiu konis tiujn ĉi, ili celen trafis ankoraŭ, la du vicoj de gastoj ekridadegis.

Maljunulo kun grizaj haroj alvokis: «La vojaĝantoj por Mezidono, envagoniĝu!» Kaj estis gajecaj hurladoj.

Ĉe la fino de la tablo, najbaroj, kvar knabegoj, preparis ŝercojn al la novaj geedzoj, kaj ŝajnis, ke ili elpensis bonan ŝercon, tiom ili piedfrapis fluŝtrante.

Unu el ili, subite, profitante de kvietita momento, kriis:

– Estas la ŝtelĉasistoj kiuj amuzegiĝos dum tiu nokto, kun la luno kiu estos!... Diru do, Johano, ne estas tiu luno [*pugo*] kiun vi gvatos, ĉu ne?

La novedzo abrupte sin turnis:

– La ŝtelĉasistoj, ke ili venu!

Sed la aliulo ekridis :

– Ha! Ili povos veni; vi ne forlasos la taskon pro tio!

La tuta kunmanĝantaro estis skuita pro la ĝojo. La grundo tremis, kaj la glasoj vibris.

Sed Johano pro la ideo, ke oni povus profiti de lia nupta nokto por ŝtelĉasi sur liabieno furioziĝis:

– Mi nur diras tion: ke ili venu!

Tiam estis pluvo da maldecaĵoj, ĉiuj dusencaj, kiuj ruĝigis iom la novedzinon, tute tremetanta pro la atentado.

Poste, kiam oni estis drinkinta bareletojn da pombrandoj, ĉiu foriris enlitiĝi; kaj la junaj geedzoj eniris en sian dormoĉambron, lokita ĉe la teretaĝo, kiel ĉiuj farmbienaj dormoĉambroj; kaj kiel estis iom varme, ili malfermis la fenestron kaj fermis la ŝutojn. Malgranda lampo de malbona gusto, donaco de la patro de la edzino, lumigis sur la komodo; la lito estis preta por ricevi la novan paron, kiu ne faris, okaze tiu unua edza nokto, la tutan ceremoniaron de la urbaj burĝoj.

Jam la juna virino estis demetita sian kapveston kaj sian robon, kaj restante subjupe, ŝi demetis siajn botetojn, dum Johano finfaris fumi cigaron, rigardante oblikve sian kompaninon.

Li gvatis ŝin per flagreta okulo, pli karna ol tenera; ĉar li deziris ŝin plivole ke li amis ŝin; kaj subite, per abrupta movo, kiel viro kiu tuj eklaboros, li demetis sian vestaĵon.

Ŝi jam demetis siajn botetojn, kaj nun ŝi demetis siajn ŝtrumpojn, poste ŝi diris al li, ciumante lin ekde la infaneco: «Ci iru kaŝi cin tien, malantaŭe la kurtenoj, por ke mi enlitiĝu.»

Li ŝajnis malakcepti, kaj per kaŝema mieno li iris tien, sin kaŝis, krom la kapo. Ŝi ridis, volis kovri liajn okulojn, kaj ili ludis ame kaj gaje, sen lernita pudoro kaj sen ĝeno.

Por fini li cedis; tiam ŝi tuj malnodis sian lastan subjupon, kiu glitis laŭlonge ŝiaj kruroj, falis ĉirkaŭ ŝiaj piedoj, kaj ronde platiĝis teren. Ŝi lasis ĝin, transpaŝis ĝin, nuda sub la flosanta ĉemizo, kaj enŝoviĝis en la liton, kies risortoj ekkantis sub ŝia pezo.

Tuj li alvenis, jam senŝuigita, kun sia pantalono, kaj li kurbigis sin al sia edzino, serĉante ŝiajn lipojn, kiujn ŝi kaŝis en la kapkuseno, kiam fore pafis eksonis, direkte de la arbareto de la Raspitaj, ŝajnis al li.

Li rerektiĝis, malkvieta kun la koro kuntirita, kaj kurante al la fenestro, li malkroĉis la ŝutron.

La plenluno inundis la korton per flava lumo. La ombro de la pomarboj faris ĉe iliaj piedoj malhelajn makulojn; kaj fore la kamparo, kovrita per maturaj rikoltoj, brilis.

Ĉar Johano kliniĝis eksteren, gvatante ĉiujn noktajn obtuzajn bruojn, du nudaj brakoj volviĝis sub lia kolo, kaj lia edzino kuntirante lin malantaŭen murmuris: «Lasu do, kion tio faras, venu.»

Li sin turnis, ekkaptis ŝin, brakumis ŝin, karesante ŝin sub la leĝera tolo; kaj levante ŝin per siaj fortaj brakoj, li alportis ŝin al la kuŝejo.

Ĉe la momento, kiam li metis ŝin sur la liton, kiu fleksiĝis pro la ŝarĝo, nova detonacio, pli proksime tiu ĉi, ekbruegis.

Tiam Johano, skuita de tumulta kolero, sakris: «Diable! Ĉu ili kredas ke mi ne eliru pro ci? Atendu, atendu!» Li sin ŝuis, malkroĉis sian pafilon, kiu estis ĉiam pendita kaj atingebla, kaj dum lia edzino trenis sin al liaj genuoj, kaj freneze petegis lin, li sin liberigis vigle, kuris al la fenestro, kaj eksaltis en la korton.

Ŝi atendis unu horon, du horojn; ĝis la ektagiĝo. Ŝia edzo ne reheimeniĝis. Tiam ŝi perdis la saĝon, alvokis, rakontis la furiozon de Johano, kaj lian kuradon post la ŝtelĉasistoj.

Tuj la bienservistoj, la ĉaristoj, la knabegoj foriris por ŝercadi la estron.

Oni retrovis lin je du leŭgoj de la farmbieno, ŝnurligita dekape ĝis piede, duonmortinta pro la furiozo, lia pafilo tordita, lia kuloto inverse, kun tri forpasitaj leporoj ĉirkaŭ la kolo, kaj aviztabulo sur la brusto:

«Kiu ĉasadas, sian postenon perdas.»

Kaj, pli malfrue, kiam li rakontis tiun noktan geedziĝfeston, li aldiris: «Ho! pri serĉo! estis bona serĉo. Ili kaptis min per maŝkaptilo kiel kuniklo, la kovarduloj, kaj ili kaŝis al mi la kapon en sakon. Sed se iam mi rekonas ilin, ke ili timu!»

Jen kiel oni amuziĝas dum la tagoj de edziĝofesto en la normanda lando.

Eltiraĵo de la "Contes de la Bécasse" [*Fabeloj de la Skolopo*]